HUNGARA VIVO

ESPERANTA MAGAZINO

5
1975
8,–Ft

VINEKONOMIAJ ENTREPRENOJ VINKELMASTRUMOJ

BORGAZDASÁGI VÁLLALATOK
PINCEGAZDASÁGOK

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: H—1081 Budapest
Kenyérmező u. 6.
Poŝta adreso: H—1368 Budapest
Pf. 193
Aperas dumonate
XV. jaro 1975. 5-a numero
Numero pri Ferenc Szilágyi

ENHAVO

V. Benczik: Ferenc Szilágyi, la pseŭdo-filistro 1
F. Szilágyi: Markizo Rabarbo en verdo 4
William Auld: Memore al Ferenc Szilágyi 5
F. Szilágyi en Esperantujo 6
J. Vajda: En la arbaroj Val'a — Tr. F. Szilágyi 6
F. Szilágyi: Tiel okazis, aŭ Mistero Minora — Prezento: V. Benczik 7
El la verkaro de F. Szilágyi — Komp. I. T. 10
K. Kalocsay: La ĉiomflankulo 11
F. Szilágyi: Vivraporto 11
Eŭropo-premio por la hungara artmonument-protekto. Tr. J. Mátéffy 12
I. László: La junaj ambasadoroj de nia muzikkulturo 14
Lajos Kassák: Vojoj senfinaj — Tr. K. Kalocsay 15
Panoramo — Komp., trad. Sz. B. kaj K. K. 16
Ervin Fenyvesi: Sukcesa kongreso en Kopenhago 18
D-ro László Ferenc: Rezervado de akvo en Hungario. Tr. A. Pechan 20
L. Tárkony: Revuo de revuoj 25
Interesaj notoj el la gastlibro de la Mondasocio de Hungaroj 26
Szilárd Bálint: Jam 18-jara estas la infanurbo en Fót 27
Enketo de Hungara Vivo — Marinko Gjivoje, Zagreb 28
L. Kökény: En Alap ĉe EMBA 28
Imre Baranyai (EMBA): Primavero 28
O. H.: Sciencaj komunikaĵoj — rezulto de persista laboro 30
Tri verkoj de J. H. Sullivan — V. Benczik 30
Internacia Virina Renkonto — Ro—Lo 30
FERI: Krucenigmo 31
Kalendaro — Komp. L. Rieth 31
Leterkesto — Korespondi deziras 32
Sur la titolpaĝo: renesanc-balkono en la fortikaĵo Siklós, foto de Tamás Mihalik

Ferenc Szilágyi, la pseŭdo-filistro

Nia juna kulturmovado ĉiam estis — kaj ankoraŭ estas — malriĉa je veraj talentoj, kiuj havas ankaŭ la necesan persiston kaj dediĉitecon por la afero elektita. Ili vere ne abundas, kaj tio havas siajn negativajn konsekvencojn por nia kultura evoluo, sed samtempe ĝi rezultigas minimume unu pozitivan fenomenon. Nome, tiuj malmultaj neniam tro-specialiĝas, kio siavice nepre elŝirus ilin el la rava tuteco de la vivo, sed sub la premo de la realaj bezonoj ili devas okupi sin pri pluraj aferoj. Kaj, ĉar temas pri escepte kapablaj personoj, ili majstriĝas preskaŭ sur ĉiuj kampoj, kiujn la neceso al ili trudis. Tiel nia malriĉo fariĝas fonto de neviditaj riĉaĵoj: nia kulturhistorio produktis ĝis nun almenaŭ dekon de tiaj novrenesancaj multflankuloj. Unu el ili estas Ferenc Szilágyi.

Li naskiĝis la 1-an de februaro 1895 en Budapeŝto. Priskribi la mizerajn cirkonstancojn, inter kiuj li edukiĝis kaj pasigis sian junaĝon, estas superflue — pli kompetente kaj konvinke li faras tion mem en sia *Vivraporto*. La intermilita mizero kaj la rasisma politiko de la tiama hungara reĝimo en 1938 devigis lin elmigri al la neŭtrala Svedlando, kiu jam dum pli ol cent jaroj povis eviti la Eŭropajn militojn, multaj esperis do, ke ĝi ne rompos la pacan tradicion. Szilágyi kiel esperantista prelegisto jam pli frue faris longajn vojaĝojn tra Svedlando, kaj post lia elmigro certe ne mankis bonaj amikoj — esperantistoj — kiuj helpis al li establiĝi tie.

Jes ja, la esperantista kariero de Szilágyi — kiel tiu de la plej multaj esperantistoj — komenciĝis en la kluboj. Li esperantistiĝis en 1925 kaj baldaŭ fariĝis ŝatata kursgvidanto kaj preleganto en la Budapeŝtaj kluboj. Li ne estis tiel moviĝema, kiel nia hidrargo-simila Baghy, sed tamen li bone konis la movadon, nepre pli bone ol liaj verkistoj-kolegoj en la redakcio de Literatura Mondo. Liaj okuloj estis akraj, kiel devas esti ĉe bona ĵurnalisto, kaj fakte li apartenas almenaŭ al la krema kvino de nia publicistiko.

La disvolviĝo de lia literatura kariero ŝuldiĝas al la ekapero de la dua periodo de Literatura Mondo. (Kiel multe ni ŝuldas al Vilmos Bleier!) En la redakcio de tiu revuo regis vere krea atmosfero, kaj la agemo kaj dediĉiteco de la kolegoj — Kalocsay, Baghy, Totsche (Tárkony), Bodó ktp. — efikis instige al Szilágyi. Sed eble pli ol la propra kreado katenis lin la sorĉo de la redaktora laboro. Por lia altruisma animo ĉiam donis veran kontentiĝon certigi forumon por aliaj, instigi aliajn homojn esprimi sin, riĉigi la komunan kulturtrezoron per novaj valoroj. Kun la sama ama zorgo, kiel Kalocsay Literaturan Mondon, li vartis la revuon Norda Prismo, kies gravecon por la originala kulturo nur nun, post ĝia morto ni sentas vere.

Tamen, ne la ekapero de la dua periodo de Literatura Mondo signifis la absolutan komencon. Szilágyi, la posta sukcesa originala prozisto, debutis kiel poemtradukisto, kaj jam nur kvar jarojn (!) post sia esperantistiĝo li faris paŝon, por kiu necesis ne malmulta aŭdaco en la lando de la diktatore perfektema Kalocsay: li eldonis en 1929 memstaran tradukvolumon *Poemaro el Hungarlando*. En

la kolekto aperis versaĵoj de 53 hungaraj poetoj de kvar jarcentoj. Li montriĝis ne sentalenta tradukisto, iuj liaj tradukoj eltenis eĉ la severan prijuĝon de Kalocsay, kaj eniris poste la *Hungaran Antologion*. Tiu grandega poezia fortostreĉo multege influis lian lingvouzon, kaj veroajne lia orelrave densa, tamen agrable natura proza stilo havas tie sian ĝermon.

Kio do tiris lin al la prozverkado? La ĉefa motivo estis verŝajne la postulo de la praktika vivo. La gazetoj atendis de li artikolojn — li estis ofta artikolisto de Hungara Heroldo — kaj ankaŭ la multnombraj prelegoj en la kluboj devigis lin produkti konstante amasojn da bone konceptitaj frazoj. La ofta buŝa uzado de la lingvo favore influis ankaŭ lian stilon: liaj vortoj ĉiam vivas, neniam spiras el ili odoro de laboratorio.

Tamen, al la prozo tiris lin ne sole la neceso. Kontraste de la plimulto de la esperantistaj literaturistoj, li ĉiam vivis en la realo, kaj por li ĝi ŝajnis pli bone kaptebla per prozo. Li ne havas grandajn pensojn pri la mondo, kaj verkante ne serĉas nuran veston por siaj mondsavaj ideoj, sekve el liaj verkoj neniam elpendas la rubando de la aŭtora filozofio, kiel tra la buŝo de la pentritaj sanktuloj. Liaj veraj inspirantoj estis la realaj fenomenoj de la mondo, kaj li sentis bezonon unuavice nur priskribi ilin, kaj ne mediti pri ili aŭ tiri konkludojn. Tiel multaj liaj mallongaj verkoj ŝvebas ie inter la fikcio kaj ne-fikcio, rakonto kaj felietono. La lanĉo de la temo preskaŭ senescepte konjektigas publicistikaĵon, ofte sensignifan. Tamen, se la disvolvo de la temo eĉ ne kondukas al spirhaltigaj altoj, la leganto ne sentas sin trompita: li ĝuas bonstilan artikolon aŭ felietonon. Sed ĉe la plej sukcesintaj pecoj li havas la senton renkonti juvelon en la kuireja manĝilar-tirkesto. Tiu proprajo de la Szilágyi-verkoj ne limiĝas al la fruaj jaroj de la verkista kariero; la matura Szilágyi neniam fariĝis arogantulo, li sciis respekti la praktikaĵojn, kaj la ĝenroj de la ĵurnalismo neniam fariĝis fremdaj por li. Beletro kaj ĵurnalismo en lia verkaro vivas veran simbiozon, neniu el la du povus ekzisti sen la alia.

Tamen, la unua prozvolumo, *Trans la Fabeloceano*, ankoraŭ ne tro ravas la pretendemajn legantojn. Sendube, la volumo enhavas agrablan prozon, tamen, la „modernaj fabeloj" estas pli bonstila legaĵo ol vera literaturo. Malgraŭ tio, ankaŭ tiu ĉi volumo ne restis senkontakta kun la posta vivoverko: ĉi tie trejniĝas kaj maturiĝas lia leĝera, milda ironio, multe parenca al tiu de la hungaro Jenő Heltai. Tiu ĉi ironio fariĝas konstanta — kvankam ne dominanta — elemento de liaj verkoj, kaj donas specialan aromon al la Szilágyi-prozo. Dank' al tiu ironio li sukcesas eviti la danĝeron de la ekstremeco en la prezento de siaj temoj, tiom ofta en la originala literaturo.

Sed la komenco de la tridekaj jaroj jam naskis ankaŭ verajn ĉefvenkojn. Unu el ili estas *La liberiĝo de la juĝisto*, aperinta sur la paĝoj de Literatura Mondo en 1933. Ĝenerale oni konsideras, ke ĝi estas unu el la plej bonaj noveloj, iam verkitaj en Esperanto.

Tiu ĉi novelo eminente demonstras la ĉefan trajton de la sortoj en la Szilágyi-noveloj (kaj ankaŭ romano), la fenomenon de la *ne-plenumiteco*. Ĉi tiu novelo, konforme al la supre eksplikitaj, komenciĝas grize: mezaĝa juĝisto ekiras al la tribunalo, lasante hejme grumblantan edzinon. Dumvoje li ekhavas la ideon ne iri al la teda laboro, sed fari ion alian. Li iras al la stacidomo, de tie telefonas al kolego petante lin pri anstataŭo, kaj aĉetas bileton al konata banloko. En la trajno konatiĝas kun juna virino, komuna promeno tra la banloko, la pluvo pelas ilin en momente neloĝatan vilaon, kaj ili ludas, petolas sinforgese. La viro jam deziras fermi ŝin inter siajn brakojn kaj meti la kronon al sia „granda aventuro", sed la hazardo intervenas kaj lia deziro ne plenumiĝas. (Ni pripensu, kiel Baghy priverkus tiun ĉi temon!)

Same okazas ankaŭ al Karlo en la novelo *La granda aventuro*. Ĝi ne plenumiĝas, kvankam li havas ŝanceton por ĝi, sed li ne ekiras post la strangan virinon. Io malhelpas lin; tial por li, kiel por la juĝisto, restas la teda vivmuelilo. Tiu ĉi stranga „ne-plenumiteco" aperas iasence ankaŭ en la grandsukcesa romaneto *Mistero Minora:* Marteno Biro detektivas por malkovri krimon, kiu povus okazi, sed reale ne okazis, kaj lia „granda aventuro", la reakiro de Aneta ne plenumiĝas pro kaŭzo tute triviala — alia viro ŝin akiris.

Do, la grandaj agoj, grandaj vortoj estas konsekvence evitataj en la verkaro de Szilágyi. Tiu ĉi fenomeno — kiu cetere efikas refreŝige en la bombasto-maro kaj patosemo de la originala literaturo — nutras sin el pluraj fontoj. La plej grava el ili sendube estas ideologia: Szilágyi estis kaj restis etburĝo, kaj li neniam sin volis montri alia. Tiu klaso, kiel la familio de Karlo en *La granda aventuro*, kvazaŭ „sportigas" la virtojn, kaj Szilágyi nek povas nek volas formeti la rezervemon, certagradan timemon kaj filistran konduton de sia klaso. Li, kiel etburĝo, timas la grandajn agojn, sed en la mondo de li priverkita, tiu timo spegulis la realon, ja veraj grandaj agoj, do ne surogatoj aŭ fantaziaĵoj, tie estis maleblaj. Ĉe aliaj originalaj verkistoj de la epoko, inkluzive en la verkaro de Baghy, la grandaj agoj, kuraĝaj revolucioj impresas falsaj, sintrompaj. Li rigardas kun milda ironio — oni eĉ povus nomi ĝin memironio, ĉar en multaj liaj verkoj la protagonisto estas kvazaŭ *alterego* de la aŭtoro — siajn fiaskantajn „heroojn", kaj ĉiam evitas disvolvi ilian tragedion. Lia rakonta tono estas sordinita, filistre rezervema, sed oni sentas, ke ĉio ĉi nur estas kvazaŭ masko, kaj en la profundo tamen tempestas tragedio. (Lia rezervemo iel memorigas la sordinitan prezentmanieron de la granda hungara filistro-geniulo, la poeto János Arany.) Ĉe li, same kiel en la verkoj de Szilágyi, muĝas, hurlas ne la vortoj, sed la sub-surfaca profundo, kaj tio vekas fortan, ne dissolvitan streĉitecon en la leganto.

El ĉio ĉi konkludiĝas ankaŭ la ĉefaj trajtoj de lia verkista mondrigardo: indulga, prudenta humanismo kaj forta etikismo. En ĉiu lia verko tiuj ĉi trajtoj ĉeestas,

ĉiun sian temon li aliras kiel etikulo, kaj la disciplinon de sia etika normaro li ne forĵetas eĉ por kurta momento, tamen neniam surprenas la pozon de profeto, de iaspeca ĉioscia savonto de la homaro.

La transloĝiĝo al Svedlando sendube estis forta ŝoko por la jam pli ol 40-jara viro. Lian verkaron dense trateksas la konkretaj kaj psikaj problemoj de la vivado en fremda medio. Ili aperas tre ofte kiel rekta temo *(Inter Sudo kaj Nordo: A, la optimisto* ktp.), sed eĉ en verkoj kun alia temo ili estas almenaŭ aluditaj. La plej impresa el ĉiuj estas la novelo *Nila*, en kiu la ĉarma kvarjara protagonistino pri knabo parolanta al si mem rezonas, ĉu li estas mensmalsanulo aŭ *eksterlandano?* En alia novelo infano, vidante unuafoje dum sia vivo eksterlandanojn, demandas: estas strange ne esti svedo, ĉu ne? Estas sciate, ke Szilágyi bone enhejmiĝis en la sveda socio, same kiel la protagonisto de lia romaneto, Marteno Biro, tamen li ne povis malvesti sian hungarecon. (En 1966, post preskaŭ 30-jara foresto, lia hungara prononco estis tiel perfekta, ke la aŭtoro de tiu ĉi artikolo eĉ post kvaronhora interparolado pensis lin Budapeŝtano.) Tiu ĉi temo sendube estas multe propra al nia internaciema literaturo; estas nur bedaŭrinde, ke ĉi-teme Szilágyi ĉiam ligiĝas troe al konkretaĵoj kaj restas iom felietone supraĵa.

Jam pli frue ni tuŝis pretere la stilon de Szilágyi, sed ĝi nepre meritas pli da atento: multaj kritikistoj konsideras ĝin la plej valora kontribuo de lia verkaro. Kiel jam dirite, la koncizeco de lia stilo estis hardita jam komence de la verkista kariero per ega poezitraduka fortostreĉo, ĝia natureco per sennombraj zorge preparitaj prelegoj. Tiu duflanka trejnado ne ĉesis ĝis la fino de lia vivo, kaj lia preskaŭ seninterrompa redaktora aktivado ankaŭ devigis lin koncepti multegajn esperantlingvajn frazojn. Dum ĉe iuj esperantistaj verkistoj la vivoverko, distinita al la eterneco, praktike egalas kun la sumo de la frazoj iam skribitaj kaj diritaj en Esperanto, ĉe Szilágyi ĝi nur reprezentas onon: li

F. Szilágyi (maldekstre) kun siaj gastoj, 1965

konstante uzis la lingvon por ĉiaj celoj, kio multe fortigis la naturecon de lia stilo.

Sed la stilon de la Szilágyi-verkoj karakterizas ne nur tiuj du trajtoj. Kiel tria, kaj eble la plej grava, aldoniĝas gia elvokiveco. Li ne hezitas surpaperigi parolturnojn tute nekutimajn, ĉi-koncerne li neniam timas riskon. Lia inventemo estas neelĉerpebla, se temas pri sukaj esprimoj, kiel *mia kredo ne estas 24-karata, mi sentas kriantan malsaton, mi knedas en min iom da trankvilo* ktp. Speciale libere kaj kree li manipulas per la vortordo. Tre malofte li sekvas la skeman vicon — subjekto, predikato, ceteraj elementoj — sed konstruas frazojn tute individuajn. Li multe utiligas ĉi-kampe la proprajojn de sia gepatra lingvo, surpaperigas foje-foje frazojn, kiujn ĉiu hungara kursvidanto korektus en la laborajo, de kursano kiel orelofendan hungarismon, sed en lia kunteksto ili tamen ricevas specialan brilon. Meritus apartan analizon la alterno de la longaj kaj mallongaj frazoj en liaj tekstoj, kio garnas lian prozon per agrabla kaj unika ritmo. Tre elegante li faras — precipe en *Mistero Minora* — la transiron el rekta stilo en nerektan, kaj inverse.

Lia lasta proza verko, kiu iasence resumas lian pli fruan verkaron, kaj samtempe iomete ankaŭ primokas ĝin — ĝi ŝvelas de memironio — prezentas ankoraŭ unu alian studindan trajton: la ĝisosta epikisto Szilágyi vaste utiligas la rimedojn de la filmo kaj radiodramaturgio, tamen, ankaŭ tion li ne prenas serioze. Estas bedaŭrinde, ke ankoraŭ neniu faris detalan analizon de tiu ĉi eta ĉefverko. Estas certe, ke ĝi multe malkovrus el la pensaro de la maljuna Szilágyi. Kvankam la publika opinio emas konsideri lia ĉefverko la novelaron *Koko krias jam!*, povas esti, ke tiu ĉi ŝajne senpretenda romaneto longe postvivos ties pecojn.

Szilágyi nuntempe estas konsiderata kiel prozisto, kaj prave, kio koncernas lian postmilitan agadon. Tamen, en la tridekaj jaroj li estis almenaŭ multpromesa poeto, unu el la „dekduanoj" (debutintaj, libroforme en la Kalocsay-a antologio *Dekdu poetoj)* kaj kvar el liaj poemoj eniris ankaŭ la *Esperantan Antologion.* Li bone regas la formon, lia poezia lingvajo estas almenaŭ inteligenta. Sentiĝas forta influo de la hungara simbolismo, precipe de Endre Ady. (Oni komparu la poemojn *Batalo kun la Grandsinjoro* aŭ *Antaŭ Princo Silent'* kun *La Spegulfiguro!)* Sed Szilágyi

Ferenc Szilágyi:

Markizo Rabarbo en verdo

Kiu estas Dua? Vi ne konas ŝin. Mi mem renkontis ŝin la unuan fojon dum mia sonĝo en la teatro. Kun ŝi venis Uno kaj tie ni interprezentiĝis. Estis tre bela teatro en la vakuo kun granda spektejo. La duono de la publiko rigardis al nia scenejo, la alia duono dorse al ni rigardis la alian scenejon kilometrojn malantaŭ ni. Super ni estis grandiozaj steloj, sed mi satelumis nur ĉirkaŭ Dua, kiu estis ĉarma knabino. Pri Uno mi tuj rimarkis, ke li estas bona knabo, iom tro pedanta, dum mi forgesis unu el miaj ŝuoj kaj tio tre ĝenis min. Sed Dua diris, ke tio estas bagatelo, oni povas demeti la alian ŝuon kaj ne plu estas problemo.

La teatraĵo promesis multe. „Markizo Rabarbo" estis ĝia titolo. Oni estis plena de streĉo, precipe mi, kiu sentis, ke io ne estas en ordo kaj fraŭlino Dua ne estas sufiĉe reale ligita al mi, dum mi arde ĵaluzis je Uno. Dum la paŭzo ni ĵetis kubon kaj mi gajnis unu el liaj ŝuoj kaj mia afero almenaŭ tiurilate ja ordiĝis.

La kurteno leviĝis. La scenejo estis tute malhela kaj oni nur konjektis la konturojn de du rolantoj. Ekstere malbonaŭgure muĝegis la vento.

— O-o-o — diris virvoĉo. — Tia nebulo!

— Nebulo? — diris virino. Kie? Mi vidas nenion.

Li: Kompreneble . . . Ĉar estas tiel nebule . . . Tia vespero . . . Mi kredas, ke li . . .

Ŝi: Li-i?

Li: Precize li. Certe ni vidos lin hodiaŭ. Se ne estos tro nebule.

Ŝi: O-o-o. Ĉu li venos?

Li: Jes, markizo Rabarbo, la maljuna fripono.

Ŝi: Tiam ĉio estos finita. Se Rabarbo . . . venos . . . Sed kial vi kredas, ke li venos ĉivespere?

Li: Rigardu la betulon antaŭ la fenestro. Ĝi vidiĝas eĉ en la nebulo. Antaŭhieraŭ ĝi aspektis kiel aŭtobushaltejo en Bamako.

Ŝi: Bamako? Ĉu vi iam estis en Bamako?

Li: Mi? . . . Kial? . . . Bamako? . . . Strange . . . Neniam.

Ŝi: Kiel vi do povas scii, kiel bushaltejo aspektas en Bamako?

Li: (reveme) . . . kiel ĉi tiu arbo . . . antaŭhieraŭ. Hieraŭ ĝi aspektis kiel renversita polvsuĉilo . . .

Ŝi: (kun angoro) Kaj . . .?

Li: Hodiaŭ estas io tre rimarkinda. La betulo aspektas kiel betulo . . .

Ŝi: Strange. Tial vi kredas, ke Rabarbo venos.

Li: Jes. Sed cetere li sendis ankaŭ telegramon. (Legas.) Mi venos stop Rabarbo.

Dum tiu sceno la scenejo plilumiĝis. Envenis amaso kun krio: „Terure! Li venas. La Markizo jam venas. Rabarbo ĉe la arbo!" Kaj subite jen timiga siblo, pantoflado, silento, el kiu ekspiralis sangfrostiga muziko kaj enpaŝas terure kadu-

---

ne estis lirika talento, kaj, kiel Kalocsay skribis, iel mankas en liaj poemoj la senpereco. Sendube la plej impresa peco de lia poezia postlasaĵo estas *Vivraporto*, kie la temo mem estas iagrade epika, kaj tiel ĝi estas multe pli konvena al la karaktero de lia talento. Li verkis poemojn ankaŭ en la postmilita periodo, sed ili povas esti konsiderataj periferiaĵo de lia literatura agado.

Grava, kaj kvante eble la plej grava parto de lia verkaro estas la tradukaĵoj. Lian grandan poezitradukan fortostreĉon ni jam tuŝis pli frue, sed li vere elstaris kiel tradukisto de prozo. Li estas tradukinto de signifa parto de la prozo aperinta en *Hungara Antologio*, kion poste sekvis sennombraj noveltradukoj, precipe sur la paĝoj de Norda Prismo. Aparte atentinda estas la *Sveda Novelaro*, aperinta en 1950, kiun li tradukis sola. Dum la lastaj tri jardekoj de sia vivo li fariĝis fakte kultura ambasadoro de du literaturoj en Esperantujo: de la hungara kaj sveda. Vere nobla kultura misio, aparte inda al esperantisto.

Oni povus skribi apartan studon pri lia recenzista, kritikista agado. Sur la paĝoj de Literatura Mondo kaj Norda Prismo (kaj ankaŭ aliaj gazetoj) aperis el lia plumo sennombraj recenzoj, el kiuj almenaŭ duono meritus esti savita por la postepoko. Liaj recenzoj atestas, krom pri kuraĝiga bonvolo por la aŭtoro de la recenzata libro, ankaŭ pri vera kompetenteco kaj sincero. La mikroanalizon li ne ŝatis, sed lia denaska bongusto kaj bontrafa intuicio ĉiam helpis al li eviti erarojn.

La verkoj de Szilágyi apartenas al la plej temprezista parto de nia kulturo. Ĝi edukas al internaciismo milojn kaj milojn de esperantistoj, kiel lia disfamiĝinta lernolibro — tradukita jam al ok lingvoj — edukis plurajn milojn da homoj esperantistoj. Kaj ni ne forgesu, ke la fakto, ke la kontinuecon de nia literaturo ne rompis la dua mondmilito, ŝuldiĝas precipe al Szilágyi kaj Stellan Engholm, kiuj en la nemilitanta Svedlando nutris la flamon de la Esperanta kulturo. Kaj dum troviĝos homoj similaj al la poetoheroo de lia novelo *Libera rabo*, liaj verkoj, plenaj je humanismo, ĉiam trovos legantojn.

Vilmos BENCZIK

ka figuro. La Markizo. Mizera maljunulo kun malica aspekto. Lamanta kaj lamentanta:

— Mi havas malarion ... Mi havas gangrenon ... mi havas teruran febron ... mi havas spasmojn ... mi havas otiton ... mi havas ĉion ... akuŝfebron ... mi estas terure malsanaaa ...

La tuta aktoraro plorante eĥis la plendojn de la Markizo dum kelkaj longaj minutoj, kiam aperis la reĝisoro kaj anoncis, ke pro la grava malsano de la Markizo oni devas prokrasti la prezentadon ...

Tiam diris Dua ke ni rapide foriru. Malantaŭ ni la furioza publiko ekbruligis la teatron. Ni iris meze kun Dua. Ŝi trankvilige premis de tempo al tempo mian brakon. Mi iĝis pli maltrankvila. Sub mia alia brako estis teko. En ĝi estis raraĵo: Esperanto-inkunablo.

(Haltu! Inkunablo ... devas esti libro antaŭ 1500 ...)

Kompreneble: Mezepoka Esperanto. Pri tio skribis jam Kalocsay.* Ni baldaŭ venis al Groenlando. Sur la marbordo staris iu, kiu parolis kun la plej proksima esperantisto sur la alia bordo de la Oceano en Usono. Ili parolis sen aparato. Kial krii tiel terure? — mi pensis. La usonano demandis la groenlandanon: — Kion vi faris hodiaŭ? — Mi fiŝkaptis. — Kiom da fiŝoj vi kaptis? — Nenian fiŝon, samideano. — Kiel do vi povas scii, ke vi fiŝkaptis? (Hu, kiel malnova historio, mi pensis. Antaŭ cent jaroj oni jam povis legi ĝin en la Heroldo.) Sed Uno kaj Dua ridis plenkore. Tiam venis al ni granda fiŝo. „Kiu vi estas?" mi demandis. — „Mi estas tiu fiŝo, kiu ne estis kaptata, kaptita, kaptota. T. e. mi volas ricevi kompreneblan klarigon, ĉu mi ne estis kaptata, aŭ ne estis kaptita, aŭ ne estis kaptota kaj entute kiel ne estas pri la participoj. Dua ektimiĝis. Ŝi tiris sin al Uno kaj la ondoj ŝaŭmis verde kaj kolere.

Mi kaptis la manon de Dua kaj kolere turnis min al la Fiŝo. — Ĉu vi do estas tiu nenia fiŝo ... — Jes, diris la fiŝo ... — Vi do estas nenia fiŝo ... — Jes, tion mi jam diris ... — Vi do povus esti kiel nenia fiŝo io tute alia ... — Jes ... diris la fiŝo, mi povus esti kiu ajn, kiun la groenlandano ne kaptis ... — Ekzemple reĝo. — Kompreneble, diris la fiŝo ... — Vi povus esti mia ŝuo, kiun mi forgesis hejme ... — Eble, diris la fiŝo ... — Vi estas do mia ŝuo kaj mi ne kutimas en sobra stato konversacii kun mia ŝuo. Hontu! La Fiŝo malaperis.

Nun venis la turko. Li estis tre afabla persono. Li parolis Esp-e kaj li jam sciis pri mia inkunablo en la teko. Li asertis, ke lia frato, kiu cetere estas denaska japano, havas similan trezoron. Ni jam estis antaŭ la domo, kie ili loĝis. Dua kaj Uno diris, ke la afero devas ege interesi min, mi iru por kelkaj minutoj, sed baldaŭ mi revenu. Ili promenos ĉi tie. Hezite mi sekvis la turkon. En la loĝejo estis amaso de muzeaĵoj kaj diversnaciaj gefratoj, sed nenia inkunablo. Mi rapidis reiri al Dua. La turko ĝentile portis post mi mian tekon. Kiam mi forlasis lin kaj renkontis Duan kaj Unon, mi konstatis, ke la turko ruze ŝanĝis mian tekon. En tiu teko estis nur unu ŝuo kun la etiketo: nenia fiŝo. — Kun indigno mi reiris al la domo, Uno kaj Dua sekvis min, sed intertempe oni kamuflis la domon. Ne estis eble retrovi la loĝejon. Ni intertraktis ekscitite. Tiam ... tiam ...

— Vi vekiĝis, se mi ne eraras ...

— Geniulo — grandioze ... efektive ni vekiĝis ...

— Vi? Vi-i-i-j?

— Jes. Uno, Dua kaj mi ...

— Ulo, ne frenezigu min. Vi ĉiuj tri ne povis vekiĝi. La aliaj du troviĝis nur en via sonĝo.

— Grandioze ... Mi pensis tiam absolute la samon. Tri personoj ne povas sonĝi la samon ...

— Kaj?

— Tiam mi diris al mi: „Tio estas nur sonĝo" kaj ekskuis min, je kio mi vere vekiĝis — jam sola.

(El „Norda Prismo" 1962/3)

* Vidu en *Lingvo, Stilo, Formo*, p. 136—142. (Noto de la R.)

WILLIAM AULD:

MEMORE AL FERENC SZILÁGYI

Estingiĝis meĉ' en nordo,
disluminte kun fidel'
malgraŭ blovoj de la sorto,
tra la jaroj sen ŝancel',
de Danub' ĝis sveda bordo:
sankta flamo en kapel'.
Korojn multajn ĝia lum'
gvidis milde al plenum'.

Nun blindiĝis la okuloj,
tro subitas la obskur';
pro l' eternaj temp-postuloj
ĉesis granda aventur'.
En lontanaj mondanguloj
limgardantoj de l' kultur'
mutas en funebra trist',
mortis kara fabelist'.

Mortis homo, kiu kredis:
Esperanto venkis jam!
„Per, ne por" li etikedis,
agis mem laŭ ĉi proklam';
tiun kredon ni heredis,
kaj memoros lin kun am';
lumu ni en fortostreĉ' —
estingiĝis brava meĉ'.

Ferenc Szilágyi en Esperantujo

BALDUR RAGNARSSON (ISLANDO)

Neniam vid-al-vide mi renkontis D-ron Ferenc Szilágyi. Tamen, jam ekde niaj komencaj interrilatoj, mi intense sentis lian personecon, simile kiel oni sentas la tuj-ĉe-manan aleston de interfoliare nevidebla birdo per ĝia atentokapta trilado. Estis Szilágyi, kiu lanĉis min kiel Esperantan poeton en sia admirinda revuo *Norda Prismo,* en 1955. Liaj akompanaj vortoj, kiuj prezentis min tiam, estis por mi strange instigaj, kredeble pro la plenfidiga konvinkiĝo konstatebla en lia esprimmaniero. Tiu feliĉa mikso de alkonkreta, neflankiĝema observemo kaj fervora, optimista idealismo ĉiam karakterizis liajn rilatojn kun verkistaj kolegoj kaj aliaj kunlaborantoj, kaj certe same lian verkadon ĝenerale. Laŭ miaj spertoj kaj opinio Ferenc Szilágyi estis ne sole elstara verkisto en nia lingvo, li estis ankaŭ, kaj ne malpli grave, unika instiganto de novaj talentuloj, kaj, kiel tia, ĉefrolulo sur la scenejo de nia kulturo dum jardekoj. Kiel li dum tiom da jaroj sukcesis aperigadi tiel elegantan kaj enhavoriĉan revuon kiel *Norda Prismo,* spite al gravaj financaj malhelpaĵoj, meritas apartan ĉapitron en nia kulturhistorio. Tiu revuo, kiun post la morto de Szilágyi William Auld redaktis plej eminente dum kelka tempo, sed kiu nun verŝajne definitive malaperis, fariĝis preskaŭ tuj post sia ekapero unu el la plej gravaj agadejoj literaturaj en la mondo esperantista. Oni tamen ne povas diri, ke Szilágyi mem planis kaj kontrolis tiun agadejon en ia diktatoreca senco, sed li estis ĝia ĉefa motoro, kiu alinvitis, instigadis, stimuladis la rolulojn, la Esperantajn verkistojn, ĉu la novicajn nespertulojn, ĉu la sinfidemajn veteranojn. Ja multon instruis al mi la kunlaboro kun li en la redaktado de *Norda Prismo.* Sed, pli grave, pere de ĝi mi iniciĝis en tiun unikan fenomenon, kiu estas la Esperanta Kulturo. Tiel, pli al Ferenc Szilágyi ol al iu alia, mi povas danki mian daŭran fidon al tiu aminda fenomeno.

BERTRAM POTTA (NOV-ZELANDO)

Kiam mi legas novelon en la nacia idiomo, mia celo estas pasigi iom da tempo kun plezuro. Sed kiam mi serĉas distron per esperantlingva novelo, mi havas du celojn: ne nur ĝui la rakonton mem, sed ankaŭ profiti de la lingva lerto de la aŭtoro. Esperanto povas konstante provizi observeman esperantiston per neatenditaj lingvaj trezoroj. Kompreneble, ne ĉiu verkisto regas la lingvon kun literatura plaĉo.

Estas feliĉe, ke oni povas atendi tiun duoblan plezuron, kiam oni esploras verkon el la plumo de Ferenc Szilágyi. Tie la leganto povas senĝene trovi interesajn vortkunmetojn kaj parolturnojn. Pro unuarangaj kreaj kvalitoj FS verkas simple kaj klarbilde kaj povas tiel vivе prezenti scenon, ke ŝajne li ĉerpas iufoje el propraj spertoj, zorge elektante siajn esprimojn kun artista percepto, kaj spicante la tekston per bongustaj trafaj figuroj. Eĉ progresintoj povas kun avantaĝo ekkonatiĝi kun nia literaturo helpe de verko de FS, kiu alkroĉos lian intereson ekde la komenco.

Estas facile konstati, ke la naturo eksterordinare dotis lin per vigla imago, kiun li ekspluatas kun facilo kaj potenco kaj per kiu li multe riĉigas nian kulturon.

Por mi en malproksima Nov-Zelando, for de la multe batita vojo, estas ĉiufoje ĝuplene flugi trans la marojn sur la magia tapiŝo de Ferenc Szilágyi, kies verkista fantazio certigas luksan kaj rapidan veturadon.

CARLO MINNAJA (ITALUJO)

Kelkaj personecoj influis la esperantan literaturon en maniero evidenta, senkompromisa, kiel ekzemple Kalocsay kaj Auld: preskaŭ ĉiu poeto en esperanto rekonas sian ŝuldon al unu el ĉi tiuj du: tia personeco estas ankaŭ Lapenna: ĉiu zorge ellaborita publika parolado inspiriĝas el lia stilo, klopodas imiti lian fortan efekton. Szilágyi influis nian literaturon pli modeste, sed same profunde, kaj la ordinara esperanto-novelisto rekonas en li amikan fraton prefere ol surpodian majstron. Kial? Ĉar tia estis la homo, amema, afabla, modesta, malalta: ja, eĉ staturo povas krei senton de supereco aŭ de intimeco. Intimecon proponas ankaŭ la literatura ĝenro kulturita de Szilágyi: la fabelo. Infanoj, eksinfanoj, maljunuloj kolektiĝas ĉirkaŭ „oĉjo Francisko" por aŭskulti liajn rakontojn. Szilágyi ne faras la demagogian eraron rakonti nur bonhumorajn anekdotojn: li ne trompas sin mem, kvazaŭ la vivo estus nur gaja. En li alternas la amaro pri vivo ne homeca, kaj la gajo de retrovita sunradio. Preskaŭ ĉiuj novelistoj volenevole ĉerpis el li: rektan devenon prezentas Rosbach kaj Heide, influon ricevas Engholm (sed la influo estas reciproka); fluon de la stilo ĉerpas Rossetti kaj Conterno. Eble nur Szathmári kaj Schwartz vibrigas tute aliajn kordojn kaj povas lokiĝi ekster la influo de Szilágyi. Sed lia influo konsistas ankaŭ en la kuraĝigo al aliaj novelistoj kaj tradukistoj: li redaktas la rapsodiojn, li disponigas multajn paĝojn en „Norda Prismo", li antaŭparolas al „Vitralo". En „Literatura Foiro" de aŭgusto 1972, Conterno pribedaŭras, ke tro multaj movadaj, organizaj, instruaj taskoj malpermesis al Szilágyi esti ankaŭ elstara poeto kaj romanisto, kaj ŝi priploras lian amputitan agadon en tiuj branĉoj. Sed en tiuj branĉoj li estis nur sekvulo de pli kapablaj, dum en la eta reĝolando de la noveloj la plej avangarda estis li, kaj sekvuloj la aliaj.

JÁNOS VAJDA (1827—1897)

EN LA ARBARO VAL-A*

En arbaro pra-profunda,
En la densa herb' abunda
De l' azil' kaŝita Vala,
Ombro densa kaj vuala.

Ho, kiele estus bone
Vivi tiel monotone
En dometo, en azilo
Vivi pace en trankvilo.

Plu ne zorgi pri la mondo,
Pri mizero de l' mondrondo
Kaj pripensi sur la limo
La venontan en proksimo.

Pri la nuboj meditadi,
En printempaj floroj vadi
Kaj rigardi sur la monto,
En estinton, al venonto,

Nevideble, jar' post jaro,
El la seka foliaro
De l' vivarbo, je la fino
Fali al la tera sino,

Kaj en nekonata tombo
Endormiĝi sub branĉ-ombro
Plu nenion voli por mi,
Nur ripozi, dormi, dormi.

El la hungara: F. *Szilágyi*

* Nomo de hungara vilaĝo.

Tiel okazis aŭ Mistero Minora

Tra la romano de Ferenc Szilágyi

Tempestas la dua mondmilito sed Marteno Biro, juna hungaro baniĝas en la ĝojo, ĉar la hazardo feliĉigas lin kunigante al li ĉarman junan knabinon, tamen iom trospertan kaj flirteman, Anetan Bene. La interkonatiĝon sekvas kelktempa ekstaza amo, sed abrupte la memstareman knabinon ŝia laboro devigas al rondiro tra la lando. Marteno ĉagreniĝas, kaj lia malĝojo eĉ pli akriĝas, kiam Aneta ne revenas je la antaŭsignita tempo. Marteno fervore ekserĉas ŝin, sed baldaŭ evidentiĝas, ke Aneta malaperis senspure.

La kruela vento de la historio kaj la mizero pelas lin al Svedlando. Marteno, kiel talenta junulo, relative facile enhejmiĝas en la nova lando, sed la mallonga idilio kun Aneta forte vivas en lia memoro. Li laboras en redakcio de gazeto, kiel atentisto de eksterlandaj radioelsendoj, kaj foje ekaŭdas el la etero la taktojn de malnova modkanto, kiun li aŭdis siatempe de Aneta, kaj kiun kanton en tiu tempo jam neniu konis. Sed la melodion de la modkanto sekvas moderna, krueltona muziko, kaj Marteno ne povis scii, ĉu en la elsendo-inflacio de mallongaj ondoj li aŭdis la saman elsendon, aŭ simple kunsonis du radiostacioj.

Tiutempe famiĝis en Eŭropo la nomo de la komponisto Kuno Toma. Li ankaŭ devenis el la baseno de Karpatoj, kaj lian populariĝon de komponisto multe akcelis la fakto, ke dum la milito kelktempe li gvidis kontraŭfaŝisman partizanan taĉmenton. Kiam li venas por koncerti al Stokholmo, Marteno ankaŭ iras por aŭdi lin. En la koncertejo la unua afero, kiu impresas lin, estas la manoj de la komponisto...

Jes, la manoj. Tiuj manoj konsternas min. Ili estas nekutime grandaj kaj vivas aparte, kvazaŭ ili ne apartenus al la sama homo. Ili havas kvazaŭ propran forton. Ili estas pli masivaj ol la viro mem kaj unu el ili movas sin, dum la alia nur atendas. La unua pugniĝas kaj malfermiĝas. Ke liaj manoj ne estas speciale delikataj, tio estas ja natura. Sed tiuj manoj ŝajnas esti ne nur grandaj, sed mistikaj en tiu spontana forto, kiun oni povas konjekti jam ĉe la unua vido. Mem la viro estas supozeble bonkora kaj ne demona, sed la manoj jes. Mi scias jam, ke Toma estas rimarkinda pianisto, sed kiel li povas esprimi nuancojn per tiuj manoj, tion mi ne povas kompreni. Mi rimarkas, ke kelkloke la homoj sin proksimigas por flustri ion, sed ili ne kuraĝas tuŝi la silenton.

Komence de la muziko daŭre la manoj okupas mian atenton. Ĝis nun pasis nur mallongaj minutoj, kaj la atento ne disflugas. La konata muzikrecenzisto sidas kun marmorvizaĝo kaj deprenas siajn okulvitrojn, purigas ilin kaj movas sin poste tien-reen, verŝajne li faras kelkajn rapidajn notojn. Mi rigardas la manojn kaj ĵetas rapidan rigardon al la junuloj en la sama vico, kiuj elŝiras sin el la senmovo de la salono kaj klarigas ion al juna knabino. Mi rimarkas ankaŭ mian apudan najbaron, sinjorinon, kiun mi vidis ofte surstrate kaj registris kiel instruistinon. Apud ŝi sidas kalvulo, verŝajne ŝia edzo, sed inter tiuj ĉi rimarkoj min daŭre sugestas la manoj de la dirigento. Ilia surpriza senformeco, krudeco kaj samtempe ilia esprimplena moviĝo estas maltrankviligaj kontrastoj.

La muziko ondas same inter kontrastoj. La publiko sidas rigide kaj ŝajne ne tute komprene. Sed al mi la muzikpeco komencas doni per siaj al mi konataj kaj jen kaj jen reaperantaj sonkombinoj kaj intence malriĉa akompano ne bildon, sed konkretan senton pri frua mateno en iu fora antaŭurbo. Sed tio enŝteliĝas en min sen klara scio, kion mi sentas, kaj antaŭ ol tio konsciiĝas en mi, la temo ŝanĝiĝas per iom malrapida, glata tonaro, tamen ne melodia. La tonoj estas serenaj kaj ankaŭ seriozaj. La violonoj kunsonoras en unueco, kiel oni imagas la movojn de laŭ klasika modelo ekzercita armeo, sed tiun parton krucas pli kaj pli akra disharmonio en la larĝeca parto; mi kredas, ke temas pri la vekiĝo de grandurba vivo, vivo maltrankvila, sed nun reglatiĝas la instrumentoj kaj unuiĝas en iaspeca kunsento, la fortepiano komencas sian regadon, la ritmo plivigliĝas, sed en tre klare idilia ritmo, fine en senharmonieecon, en kiun kvazaŭ en kaoson enserpentiĝas iom post iom io trankvila, kio kvazaŭ ordigas la senforman kaoson dum dialogo de la basviolono kaj fortepiano. Mi devas diri, ke tiu ĉi, ne tute malpreciza, agordpriskribo ververe ne tiam, sed poste ricevis formon en mia percepto.

Tamen estas fakto, ke jam en tiu ĉi periodo de la prezentado mi havas strangan senton de io konata, ke mi havas ian komunecon kun tiu muziko, kiu estas pli altgrada, ol tiu de la plej muzikeksperta aŭskultanto. Kaj tiam okazas io. Meze de la evoluo de la komponaĵo, post la jus menciita instrumenta dialogo sekvas vulkanaj zigzagoj, fulmado de akraj klarnet- kaj bastubjosonoj, inter bruo kaj erupcia impulsemo, kelkfoje jam limiĝanta al iaj absolutaj, ne realaj dimensioj, sekvas io kortuŝa kaj skua, kaj ĝuste inter tiuj kontrastoj subite mi eksentas, ke mi estas sola, mi kvazaŭ falas, kaj jen en tiu ĉi momento el la orkestro mi ekaŭdas melodion konatan, iom purigitan, sed tute rekoneblan, la melodian varianton de la malnova ŝlagro en tute ne vulgara formo:

„Maks', la ŝejk', galope krimas..."

Tiu turno ruĝigas kaj paligas min. Mi konsterniĝas, kaj ĝi kaŭzas ankaŭ moviĝon en la cetera parto de la aŭskultantaro, sed ĝia reago estas tute alia ol la mia. La sulkaj vizaĝoj reglatiĝas, kaj

dum tiu ĉi periodo de la vigla muziko la publiko ripozas kun beata vizaĝo. Oni ĝojas pro la bloveto de la romantiko, kaj eĉ la plej modernaj oreloj malfermiĝas por ensorbi la strangan melodion, kiu laŭ diversaj arabeskoj de sia vojo fine pere de tiu ĉi komponisto nun revenas al mi.

Mi tuj vekiĝas je la fakto, ke tiu ĉi komponisto *devas* koni Anetan, kaj ke li devas scii pri ŝia sorto. Mi ne povas forlasi la koncertejon, sed volenevole mi devas plena kun senpacienco aŭskulti la muzikon. Mi rimarkas, ke en tiu ĉi muziko Aneta ĉeestas, ne kiel malgrava ideodonanto, sed kiel grava, fata, ĉefa rolanto, konstanta en la tuta verko kaj, ke tiu ĉi rolo ĉiam pli kaj pli preparas ion tragikan. La komponisto ŝpinas du strangajn, diverĝajn stilojn, ili kuras paralele, kvankam ili ne estas indiferentaj unu al la alia, kaj fine venas la klimakso, kiam la paralelaj linioj renkontiĝas en la senlimo. Dum preskaŭ la tuta tempo revenas kaj enteksiĝas la stranga ŝejkmelodio, ne kiel ia forme strikta gvidmotivo, sed kiel aktiva gvidanto de la muziko.

La ritmo kaj la laŭteco de la muziko kreskas, kaj la tonojn de la ŝlagro jam transprenas la akraj blovinstrumentoj, la melodio kirliĝas en kontraŭdiroj kaj en kvazaŭa diskuto de ŝajne kaosa, sed rimarkeble konscia akompano, kiu poste forpremas la ŝlagron; ĝi subite per akra tono, kvazaŭ kriego, helpkrio kun kolosa kaj tremiga forto forŝiriĝas, kaj la stranga muzikaĵo finiĝas per monotonaj tamburtonoj longdaŭraj. Antaŭ la fino de la komponaĵo oni aŭdas ankoraŭ kombinitan akordon de basviolono, bastubjo kaj piano, kiu donas impreson de rapida kaj forpremita plorsingulto. La malica fablo estas finita, kaj mi ne plu zorgas pri la reago de la publiko, ĉar mi scias, kio okazis, ke Aneta mortis. Mi scias, kiel ŝi mortis, ĉar la komponaĵo estas rakonto, eble eĉ protokolo, kiel ŝi mortis. Kiel, kiam kaj de kies mano!

Mano... mano! Subite mi rigardas la dekstran manon de la komponisto seriozmiena, kiu sen videbla kontenteco dankas la tondrajn aplaŭdojn. Tiu dekstra mano pendas, ĝi estas laca, oni volus diri, sed mi rimarkas, ke ĝi estas pugnigita ankoraŭ kiel dum la lastaj sekundoj de la prezentado.

Tiam klariĝas ankoraŭ unu detalo. La krimulo mem. Kuno Toma mem mortigis mian amikinon per tiu mano, kiu en la muzika interpretigo kvazaŭ ripetis sian bestan agon. Tiu viro ne povas liberiĝi de tiu lasta korpa memoro, ĝi regas lin kaj same devige perfidas lin, kvazaŭ klara konfeso, kiun li ne kuraĝas fari per vortoj, sed li devis fari per muziko. Li ŝajnas esti malfeliĉa, sed mi rifuzas ĉian kompaton al li. Mi serĉas en li la malicon, kaj mi trovas ĝin nur en la maldekstra, iom deformita okulo. Cetere neniu povus diri ion kontraŭ la honesta aspekto, sed kion povas diri la aspekto?

Mi rememoras la vortojn de Aneta. „Mi estas pli proksima al la morto ol aliaj virinoj, kiam oni amas min... Mi estas pli sincera, eble eĉ pli kruda..."

Mi mem estus povinta mortigi Anetan, kaj nun ... nun... batalas en mi du sentoj, la morna sento de ŝia tute kaj funebre finita rolo, kaj la alia, eĉ pli reganta kaj tre abomena, ke *ne mi* mortigis ŝin. Sed tiun penson mi rapide rekomandas en sian internan kaŝejon.

Aneta sentis, ke ŝi mortos, kaj ŝi sentis, kiel ŝi mortos. Ne povas esti dubo, ke tiu ĉi muziko estas la priskribo de ŝia morto!

Mi komprenigas al mi, ke estus tute neeble akuzi lin ĉi tie pro murdo. Por li estus facile elturniĝi, al mi same facile trovi lokon en iu frenezulejo. Mi devas sekvi la okazaĵojn paŝo post paŝo. Sed kiel? Mi volas neniun inici en tiun ĉi sekreton. Mi sentas min ia Sankta Georgo, kiu pretigas sin al batalo kontraŭ drako. Mi venĝos. Sed kiel. Monon mi neniam havas kaj apenaŭ eblojn trovi la fadenojn konkretajn.

Kiel tio okazis? Kiel okazis?

Kompreneble mi devas sekvi unuavice la muzikon, kaj el ĝi klariĝos faktoj aŭ almenaŭ hipotezoj, kiujn oni povos eble verigi poste.

Mi staras antaŭ giganta laboro...

Post la koncerto Toma forvojaĝas al nekonata loko. Marteno aĉetas la diskon de la muzikpeco — ĝi titoliĝas „Fabelo" — kaj plurfoja aŭskultado konvinkas lin pri sia pravo. Li komencas fervoran detektivadon, kolektas ĉiun atingeblan indikon pri la vivo de Toma, kaj konkludas, ke certe li ekkonis Anetan dum ŝia provinca rondiro. Ekkonis ŝin, sekvis amrilato, kaj veršajne la liberama vivmaniero de la knabino elvokis la ĵaluzon de Toma, kaj... Marteno detektivas plu. Li nepre devas kolekti ĉiujn indikojn, renkonti Toman, prezenti al li la pruvojn kaj venĝi. Venĝi por Aneta.

Kaj venas la tago. Dum la someraj ferioj en Londono li sukcesas renkonti la komponiston. Tiu akceptas nevolonte la junan ĵurnaliston, sed la vortoj de Marteno vekas lian intereson. Marteno analizas la „Fabelo"-n, kaj Toma ne kontraŭdiras. Post iom da tempo la komponisto invitas lin al sia hejmo daŭrigi la analizon. Marteno akceptas la inviton, kaj nur enirinte en la solecan villon de Toma li konscias pri la minacanta danĝero. Abrupte li ŝir-malfermas la fenestron kaj saltas...

Mi vekiĝas en alia ĉambro. Toma staras antaŭ la sofo, kie mi kuŝas. Mi provas movi min. Mi moviĝas. Nur ĉe la frunto mi rimarkas plastron. Sub tio buleto. Ĉu okulo? Ne, la okulo estas libera kaj sendifekta. Mi ekparolas:

— Kiu tago estas hodiaŭ?

— Ankoraŭ la sama kiel antaŭ dek minutoj. Via gimnastika demonstro finiĝis iom malfeliĉe. Ĉu vi sentas kapdoloron aŭ ion similan? Ĉu vi ne fartas malbone?

— Ne, mi ne kredas.

Mi komencas movi miajn membrojn, mi residiĝas kaj aspektas, kvazaŭ mi estus ĉe masaĝisto. Toma ne elfalas el tiu ĉi bildo. Li povus esti muskolmasaĝisto. Sed ĉio estas en ordo.

— Ĉio estas en ordo.

— Provu iri.

Mi provas iri. Komence iom malfacile, sed de sekundo al sekundo pli kaj pli bone. La obtuzo

komencas cedi en mia kapo. Efektive mi ricevis nur regulan knokaŭton ĉe mia batalo kontraŭ la arbo. Ĝi staras triumfa ekstere kaj rakontas al la venteto la okazintaĵojn.

— Mi iras tute bone.

— Vi timigis nin —, diras Toma kaj demandas:

— Ĉu ne, Bianka?

— Tuj, sonas de ekstere kaj poste enpaŝas Bianka.

— Bianka? Bianka! Bi...

Mia kapo turniĝas, kaj mi residiĝas. La ŝvelo sur mia kapo denove ekbrulas. Mi ŝajne freneziĝas. Mi ne kuraĝas alrigardi la junan virinon. Ŝi estas alta, juna, sed, tute virineca kaj Bianka...?

— Pardonu, sinjorino, ŝajnas al mi, ke mi ankoraŭ ne estas sufiĉe forta. Eble io okazis vere al mi. Mi petas pardonon, estas eble nur imago. Sed vi je la unua alrigardo memorigas iun el mia junaĝo...

— Je la unua momento?

La juna virino ekridas, kaj tuj plene restarigas la bildon de tiu alia, kiun mi ne volas akcepti viva. Sed estas ŝia rido. Ankaŭ Toma ridas. Sed lia rido estas iom pli komplika. En ĝi estas ankaŭ iom da malĝojo, iom da amaro kaj momenta maltrankvilo.

— Ŝafido sen fido, ĉu vi ne komprenas, ke mi estas mi? Aŭ ĉu mi tiom ŝanĝiĝis?

Jes, ŝi ŝanĝiĝis. Ŝi estas bela, sed ne plu la sama. Mi ne scias ĉu ŝi ne estas pli bela nun, kiam ŝi aspektas pli vere virina ol antaŭe. Sed tiam ŝi estis pli facilmova, pli malica, kaj tiu agrabla incito mankas al mi. Ŝi estis pli bela tiam. Kvankam ŝi estas ankaŭ nun juna. Ŝi iam estis mia. Sed — Bianka?

— Sed Bianka?

— Mi estis jam dekomence Bianka al li. Pli ĝuste Aneta-Bianka. Kaj kiam li forigis el nia vivo la malbelon per sia arto, li ne volis nomi min alie, nur Bianka...

— — — — — — — — — — — — — — —

...blua okulparo eklumas kaj alridas min.

— Ĉu vi ne rekonas min?

— Jes, fraŭlino, mi rekonas vin. Ni renkontiĝis ĉe iu koncerto en Stokholmo. Via nomo estas...

— Vera, ŝi diras. Kaj ni interkonatiĝis antaŭ la koncerto de Toma. Miaj amikoj Ljungstrand prezentis vin. Sed vi tuj malaperis. Kaj vi ĵus fajfis tiun petolan melodion el la „Fabelo". Momente mi kredis, ke vi volas petoli kun mi...

Mi rigardas ŝin. Belaj, helbluaj okuloj. Belforma knabino, milda, agrabla. Bele ŝi iras. Kaj ridas...

Mi pensas pri la instruo de Jozefo Bulla, kaj la ŝejko benas min.

La fato komencas novan ludon, ŝajne multe pli trankvilan.

La bluaj okuloj brilas, kaj mi revekiĝas... por denove droni en mia ankoraŭ ne tute malaperinta plezura junaĝo.

Mi rerigardas al la maro. Ĉu ne staras sur la supro de la ondoj la ŝejko kaj arlekene svingas ambaŭ manojn al mi? Stulta Makso, kara Makso!

Ankoraŭ mi sentas la kor-aflikton. Sed apud mi iras belritme Vera.

(Prezento de V. Benczik)

INTERNACIA RENKONTIĜO NATURAMIKA

IREN

ABALIGET

Ĉu vi ankoraŭ ne vizitis
la 2000-jaran urbon PÉCS?

Ĉu vi ankoraŭ ne ĝuis
la amikan esperantistan etoson de

IREN EN ABALIGET?

NE POVAS ESTI!!!
NEPRE ALIĜU AL LA

9-A INTERNACIA RENKONTIĜO NATURAMIKA

riĉa programo — favoraj prezoj — rabatoj
18—27. 07. 1976.

Teritoria komitato de HEA
H — 7601 Pécs Pf.: 2.
Hungario

El la verkaro de Ferenc Szilágyi

Ĉi tie sube ni publikigas du bibliografiajn provojn pri la verkaro de Szilágyi. Kompreneble ili ne estas kompletaj, tamen povas doni ioman imagon pri la multfaceta kaj ampleksa produkto de la aŭtoro.

La arbetaĉo kaj la eta birdo = LM 1931/8—9; Pri la ruza advokato = LM 1931/28—29; Pri la distra profesoro = LM 1931/46—47; La malsata kokino = LM 1931/143; Terura vizito en nia redaktejo = LM 1931/146—147; La sortotragedio de Horian = LM 1932/29—30; Aventura tago = LM 1933/34—35; La liberiĝo de la juĝisto = LM 1933/179—181; Kiu donis, kiu ricevis? = LM 1947/129—136; Alvoko = LM 1947/161—163; Inter sudo kaj nordo = LM 1948/161—166; La perdita velo = Esperanto 1952/25—29; H. C. Andersen = LNLR 1955/1/15—16; Sola kun la mondo = NP 1959/195—199; Zigzage en Iamujo = LNLR 1961/35/173—177, /36/ 211—215; Markizo Rabarbo = NP 1962/9192; A, la optimisto = NP 1963/77—82.

Poezio

La muzikant' kun muzikilo = LM 1931/66; La spegulfiguro = LM 1931/66; Kanto de forirantoj = LM 1931/118; Trans la Fabelocean'. Prologo de miaj „Modernaj Fabeloj" = LM 1931/188; La Tasko = LM 1931/209; Pluvo = LM 1931/ 209; Epitafo = LM 1932/104; Senmia mi = LM 1932/104; Vivraporto = LM 1932/157; Mario = LM 1933/7; Diogenes = LM 1934/23; Ho, levu min el la dolor' = LM 1935/84; Prologo antaŭ la Literatura Vespero de L.M. = LM 1937/98; Skerco — andante? = NP 1957/181; Zamenhof = LM 1959/1; Renkonto = NP 1961/8.

Recenzoj pri liaj verkoj:

La granda aventuro (L. TÁRKONY) = LM 1947/60; Koko krias jam (P. THORSEN) = NP 1955/173—174; Koko krias jam (I. ROTKOVIĆ) = LNLR 1956(5) 199—200; Tiel okazis au Mistero Minora C. C. GUGLIELMINETTI) = LNLR 1959(25) 37—39.

LM = Literatura Mondo; la jarciferon sekvas la paĝindiko.
NP = Norda Prismo; la jarciferon sekvas la paĝindiko.
LNLR = La Nica Literatura Revuo; la jarciferon sekvas parenteze la numero kaj poste la paĝindiko.

Kompilis Maria BENCZIK

I. Verkoj:

Poemaro el Hungarlando (tradukaĵoj; 1 orig. poemo: La Bela Flor') 1929; Trans la Fabeloceano (orig. rakontoj) 1931; La pentroarto en Malnova Hungarujo (trad.) 1932; Hungara Antologio (kunlab., tradukaĵoj) 1933; Dekdu Poetoj (kunlab., orig. poemoj) 1934; Humora novelaro (trad.) 1944; La granda aventuro (orig. nov.) 1945; Inter Sudo kaj Nordo (orig. nov.) 1950; Sveda Novelaro (trad.) 1950; Koko krias jam! (orig. nov.) 1955; Tiel okazis aŭ Mistero Minora (orig. romano) 1958; Esperanta Antologio (4 orig. poemoj: La tasko, Zamenhof, Vivraporto, La spegulfiguro) 1958; Ni en Skandinavio (Kuntrad.) 33 Rakontoj (Esperanta novelaro, kunredaktis R. Rossetti) 1964.

II. Noveloj:

Letero de tie, kie finiĝas la mondo (La Espero) 1934; La literatura hazardo (Suplemento al Literatura Mondo) 1936; La telefono eksonas (trad.; La Espero) 1937; Legendo (La espero) 1937; Tage — nokte (trad.; Svenska Esperanto Tidningen) 1948; La perdita velo (La

F. Szilágyi ĉe sia skribotablo

Esperanto) 1952; Letero venis (trad.; Norvega Esperantisto) 1952; Nila (Esperanto en Skotlando) 1952; Ĉirkaŭ la tero (Arbetar Esperantisten) 1953; La honoratoj ostoj (trad.; La Espero) 1954; Boeuf a la Stroganoff (Kulturaj kajeroj) 1960.

III. Artikoloj:

Malmö, urbo de mia koro (La Espero) 1947; Moderna progreso kaj moderna Sveda socia literaturo (Arbetar Esperantisten) 1951; Io, kion mi povas fari (La Espero) 1951; Peer Gynt en Esperanto (Arbetar Esperantisten) 1952; Legu! (La Espero) 1953; Internaciaj kulturproblemoj en studrondo (La Espero) 1953; Intervjuo kun Teo Jung (La Espero) 1953.

IV. Recenzoj:

Sveda Antologio (Lingvo Libro) 1935; C. Rossetti: Kredu min Sinjorino (Arbetar Esperantisten) 1951; Novaj Libroj (Arbetar Esperantisten) 1951.

V. Lernolibroj:

Lernolibroj en 8 lingvoj: La simpla Esperanto 1932; Ellernu! 1937.

VI. Manuskriptoj:

Flava papero or. nov.; F. Molnár: La dukolora viŝgumo (trad.); Karinthy: La juĝo (trad.); Vivraporto (or. nov.).

VII. Rememoroj pri F. Szilágyi:

Ferenc Szilágyi (verkis K. Kalocsay, H. V. 1965/3; F. Szilágyi 70-jara (Elsendita prog. de Pola Radio, Varsovio) 1965; F. Szilágyi 70-jara (Heroldo) 1965; F. Szilágyi (1895—1967) Verkis L. Kökény (Hungara Vivo) 1968.

La supra bibliografio ne povas kaj ne volas esti kompleta, ja en revuo la loko estas limigita. Tamen mi esperas, ke ĉi tiu mallonga kolekto ebligas al la Leganto havi sufiĉan superrigardon je la multflanka verkista kaj publicista laboro de F. Szilágyi.

Ĉi-loke mi dankas la helpon de s-ro E. FARKAS, direktoro de Hungara Esperanto Muzeo, kiu bonvolis kontribui al la bibliografio de F. Szilágyi.

Kompilis Takács I.

LA ĈIOMFLANKULO

Mi skribis foje pri Szilágyi, ke li estis tre multflanka, pli ĝuste ĉiomflanka esperantisto. Fakte, en Budapeŝto, komence de la tridekaj jaroj, li estis propagandisto kaj aranĝanto de E-aj literaturaj vesperoj. Poste li funkciis eksterlande kiel lingvo-instruanto Csehmetoda kaj proprametoda, fine li fariĝis redaktoro de E-a revuo kaj eĉ ne ia ajn redaktoro, sed unu el la plej bonaj (se ne la plej bona). Dume li verkis poemojn, novelojn kaj romanon, per kiuj li akiris por si elitan rangon en la E-a literaturo.

Koncerne la kreon de E-a kultura vivo en Budapeŝto li montriĝis fervora lertulo, se tiel diri, virtuozo. Li aranĝadis literaturajn vesperojn, en kiuj li recitigis per profesiaj versdirantoj poemojn de elstaraj poetoj, kiujn li invitis por tiuj vesperoj kaj kiuj (Karinthy, Babits, Kosztolányi, Ernő Szép kaj aliaj) plaĉe auskultis, kiel sonas iliaj poemoj en lingvo nekonata, tamen iele-tiele komprenata, laŭ la sama ritmo kaj rimaranĝo. Kiam mi interkoniĝis kun Szilágyi pli strikte, mi miris, kiel do li, tiom modesta en sia sinteno, tiom mallaŭtvoĉa, povas varbi homojn vere „malfacilajn" (aktorojn, poetojn) por la partopreno en tiuj vesperoj; tio bezonas ja grandan konvinkan, eĉ sugestian kapablon. Sed poste mi rekonis ke el li radias tia sugestio: ĝi devenis el lia nepra fido je la bonvolo de la homoj. Ĉi tie temis pri la mistero de la reciproka efiko: fido naskas fidon, bonvolo naskas bonvolon.

Sed poste venis tempoj, kaj kun ĝi homoj, kun kiuj tute maleble estis veni en tian reciprokan fidon kaj bonvolon: fidon kaj bonvolon ili respondis per la mortiga piko de la hokoj aŭ sagoj de siaj krucoj. Tiam Szilágyi decidiĝis, kun peza koro, forlasi sian patrion amatan. Ni kunestis antaŭ lia forvojaĝo. Li estis en melankolia humoro, tamen lia fido ne estingiĝis, eĉ se ĝi lumetis malpli sugestie.

Pri liaj meritoj en la multaj flankoj de lia vivoverko parolas aliaj ĉi-numere. Mi volus diri nur pri lia redaktora laboro, kial ĝi estis tiel elstara, ke li pruviĝis neanstataŭebla: Norda Prismo estis lia infano kaj devis post li morti. Lia merito estas, ke pli ol iu ajn li povis elsenti la guston kaj la intereso-sferon de la E-a publiko, donante al ĝi legaĵon sufiĉe facilan kaj leĝeran por esti facile komprenebla kaj senkaprompe ĝuebla kaj tamen sufiĉe valoran por ne esti triviala aŭ malkaraĉa. Lia recenzado estis ia afabla kaj tamen serioza areopago: li povis eldiri malaprobon tiel, ke la malaprobato sentis dankinda la bonvolon, kiu el ĝi radiis. Mi ne scias, ĉu li havis malamikon. Se jes, mi tre scivolus tiun vidi, kvankam mi timus tiun renkonti.

Kiam en la sesdekaj jaroj li vizitis sian Budapeŝton, li, kiel li mem rakontis, trovis tuj du anĝelojn sur la stratoj: unu tramkonduktorinon, kiu — ĉar li senatente preterveturis la celatan restoracion — ne domaĝis la penon en la terura interpremiĝo de la troplena veturilo descendigi lin, laŭ lia peto, ĉe bona restoracio, kaj unu policanon, kiu volis lin puni pro malregula transiro sur la ŝoseo, kaj kun kiu, anstataŭe, li miksiĝis en konversacion pri la svedaj vetero, homoj kaj moroj. Jen la mistero de la „reciproka efiko". Vere, se en la mondo la plimulto konsistus el nuraj Szilágyi, „la popoloj farus en konsento unu grandan rondon familian".

K. KALOCSAY

FERENC SZILÁGYI:

VIVRAPORTO

Jen antaŭ mi nun la Danubo,
Kaj blondas la matena ond',
Ne migras eĉ plej eta nubo
Sur varme blua horizont'.
Mi ekmeditas sur ferdeko
Pri l'propra sorto, monda peko,
Vortfluon naĝas plumo-ŝip',
Sed — gaja birdo pepas: *ĉip.*
La ŝip' min portas al Vieno,
Medit' min portus al pasint',
Sed — tie ridas verda pint'
Kaj flugas for la trista temo.
Ĉu tamen, malgraŭ multa plor',
Ankoraŭ ridas suna or'?

Intencis kanti mi alie,
Sed kaptis min la vivplezur'.
Riproĉe kaj melankolie
Ne eblas kanti sub lazur'.
Pejzaĝoj mildaj preterflankas,
Anser-makuloj borde blankas.
Min portas ŝip' kun mola lul'
Trankvile. For la vundo-brul' . .
Sed halt': Kun spita virdecido
Mi min devigas al promes':
Konfesi pri la viv'. Nu, jes:
Ne kiel grandbienulido,
Sed nur en tre modesta dom'
Naskiĝis mi, sen festa nom'.

Junaĝe mi ja panon havis,
Eĉ truajn ŝuojn sur pied',
Ludiloj fremdaj min tre ravis,
Mi songis pri velociped',
Sed mia am' — platona restis,
Kaj ankaŭ poste, dum mi estis
Lernanto de la gimnazi',
Mi ĝuis nur en fantazi'.
Nun sekvis zorgoj: kie prenu
Gepatroj monon por la fil'.
Sopiris ĉiuj ni kun mil
Esperoj, ke la Tago venu.
Ĝi venis: mi al patra dom'
Fiere iris kun diplom'.

Nun skize: Mondmilit' kaj fine,
La Paco. Mi: bankoficist'.
La bankoj „ŝparas". Mi viktime
Paradas sur la „ŝpara list' ",
Por vagi en la mondo kriza.
Kaj — ruĝa strek en vivo griza
Nun sekvis sango el la pulm'.
Edzino. Par' sub sorta fulm',
Ne certe eĉ pri seka pano,
Laboron ne serĉante plu,
Ĉar ja domaĝe pri la ŝu',
Sen mono, sen esper', sen sano,
Sen ia ŝanc' de bona nov':
Etburĝo — diras Nekrasov'.*

** Nikolaj Vladimiroviĉ NEKRASOV (1900 — ?; mortinta dum la dua mondmilito). Soveta esperantista poeto kaj tradukisto, kies ne tro sukcesan Onegin-tradukon Szilágyi malaprobe pritaksis. Nekrasov respondis en amartona versa letero, en kiu la kritikon li atribuas al la etburĝa pensmaniero de Szilágyi.*



Sopron, malantaŭe la Fajro-turo



Preĝejo de Ják, el la XIII-a jarcento

EŬROPO-premio
por la hungara artmonument-protekto

Proksime al la okcidenta landlimo situas la hungara urbo SOPRON. Ĝi estas unu el la plej malnovaj sidlokoj en Hungario, kiu ĝuste nun prepariĝas inde festi la jubileon de sia 700-jara ekzisto.

La pordo de la Sibrik-kastelo en Bozsok



Jam antaŭ 2000 jaroj grava landvojo kondukis tie nomata *Sukceno-vojo*. Sur tiu vojo importis la romiaj komercistoj el la nordaj germanaj regionoj la sukcenon (fosilia rezino) por prepari el ĝi multekostajn juvelojn. Apud tiu ĉi vojo, sur loko de la nuna Sopron, situis dum jarcentoj la romia urbo SCARBANTIA.

Sopron estas tre riĉa je artobjektoj kaj historiaj monumentoj de diversaj stilepokoj. La urbon trafis ĉi-jare granda, internacia honorigo, nome, oni aljuĝis al ĝi *oran medalon.*

Kial kaj kiel okazis tio? Jen ĝia historio.

Riĉa Hamburga komercistdinastio kreis fondaĵon kun jara buĝeto de 7 milionoj da FRG—markoj. Tiu fondaĵo jam de jaroj finance subtenas la defendon de artmonumentoj kaj la naturprotektadon. Tiu fondaĵo kreis en la jaro 1973 *Eŭropajn artmonumentajn premiojn.* Po 25 000 markojn ricevas jare du personoj aŭ societoj, kiuj atingis elstarajn rezultojn sur kampo de defendo de artmonumentoj, kaj el la sama kaŭzo en ĉiu jaro po unu oran medalon, ornamitan per portreto de Michelangelo, ricevas du urboj aŭ vilaĝoj.

La premiojn aljuĝas 7-membra internacia kuratora komisiono, kies prezidanto estas Walter FRODL, profesoro pri artobjekto-defendo en la Viena universitato, kaj ĝia membraro konsistas el angla, dana, franca, hungara, okcident-germana kaj pola fakuloj. Pro organizaj obstakloj la disdono de la premioj okazis *unuafoje*

La preĝejo en Nógrád

en 1975. Ĉi-okaze ricevis oran medalon la nederlanda urbo *Deventer* kaj la hungara *Sopron.*

Kio motivis la distingon de la hungara Sopron?

Aŭtentikan respondon ni ricevas el la protokolo de la ĵurio. „La urbo Sopron — la iama Scarbantia apud la romia Sukcenovojo — en siaj artmonumentoj konservis sian preskaŭ 2000-jaran historion, organike kunligitan kun la Eŭropa kulturo. La esploro de la historia urbokerno kaj ĝia ĉirkaŭaĵo ebligis laŭdinde laŭplane ne nur retrovon kaj videbligon de valoraj arkeologiaj, mez- kaj novepokaj artmonumentoj, sed samtempe kreis la sciencajn bazojn al la konservado plenumita kun granda respondeco kaj al riĉe varia restaŭrado. Tiuj bazoj estis ĉiam aplikataj harmonie kun la postuloj de la moderna, hodiaŭa vivo." La laŭplana rekonstruo rezultigis do modernajn loĝejojn kaj oficejojn en science, artisme restaŭritaj artmonumentoj.

La internacia ĵurio transdonos la EUROPO—premion en la urbo Sopron.

Tr. Jozefo MÁTÉFFY

Strato en Kőszeg





Kőszeg malantaŭe la malnova urbo-pordo

Fotoj de Tamás Mihalik

La reĝa kapelo en Esztergom, el la XIII-a jarcento

La junaj ambasadoroj de nia muzikkulturo

Interparolo kun la fondinta muzikestro de la junulara orkestro

Ni raportis plurfoje pri nia muzikkulturo, kiu dum la postmilitaj jaroj montris konsiderindan evoluon. Hodiaŭ ni jam povas paroli ne nur pri du Operdomoj en Budapeŝto, sed ankaŭ pri operensembloj en provincaj urboj. Kelkaj el niaj orkestroj ankaŭ dum sia eksterlanda gastrolado akiris seriozan aprecon. Tiuj faktoj — krom tio, ke ili estas ĝojindaj — fariĝis por ni jam kutimaj.

Sed apartan atenton, meritas tiu junulara ensemblo kiu okupiĝas ne profesie pri muziko, ĉar ĝi konsistas el gimnaziaj gelernantoj, tamen ĝi diligentas apud sia mezlerneja lernado en altnivela orkestra muziko.

Vizitinte Jozefon Záborszky, la estron de la orkestro, ni informiĝis pri la pasinteco, nuntempo kaj atendebla futuro de la orkestro.

Antaŭ nelonge per solena prezento vi rememoris pri la 20-jara ekzisto de la orkestro. Kiel tiu junulara orkestro evoluis ĝis la nunaj rezultoj?

Tiutempe mi dungiĝis kiel kantinstruisto al la ĝenerala gimnazio „István I." El la kantĥoro de la gimnazio mi elektis la muzikemajn junulojn por formi arĉorkestron. La tiamaj 16 gelernantoj estis la kerno de nia orkestro. La komenco estis esperiga kaj baldaŭ montriĝis pretendo, ampleksigi nian modestan ensemblon ankaŭ per blovinstrumentoj; por tio ni bezonis kelkajn fakinstruistojn. Relative frue ni devis debuti kaj sisteme aranĝi prezentadojn, por ke ni povu akiri ian financan bazon por la plua evoluigo de nia ensemblo.

Kio estis la spirita „fono" de la plua evoluo?

Post la unuaj publikaj prezentadoj montriĝis, ke la junuloj rigardis kiel privilegion esti membroj de la orkestro kaj volonte entreprenis la plusan laboron, kiun la muziklernado kaj orkestra ekzercado signifis. Ĉiujare ni partoprenigas niajn membrojn en favorpreza somerumado ĉe Balatono. Tio estas aktiva ripozo, ĉar ankaŭ dum la feriado ni kelkfoje amuzas la publikon per distra muziko.

Kompreneble aperis ankaŭ la eblo, aranĝi — helpe de la muziko — eksterlandajn vojaĝojn kaj fariĝi junaj ambasadoroj de la hungara orkestra kulturo.

Kiuj estis la pluaj stacioj en la evoluo?

Je la komenco de la sesdekaj jaroj ni jam atingis, ke ni povis aperi antaŭ la publiko kun 70-membra simfonia orkestro. Tiam ni koncertis unuan fojon en la granda halo de la Muzikakademio. Nia repertuaro entenas klasikajn komponaĵojn tiel same, kiel la verkojn de la modernaj komponistoj.

Krome ni sukcesis gajni ankaŭ eminentajn gast-muzikestrojn en la personoj de János Ferencsik, András Kórody kaj la soveta Nikolaj Anosov.

Ni aŭdis pri tio, ke via orkestro sukcese koncertis ankaŭ eksterlande. Kiajn memorojn vi gardas pri tio?

Jes, ekde la 1965. jaro ni 10-foje koncertis en la urboj de GDR, kaj 3-foje en Svisujo. En la svisa urbo St. Moritz ni partoprenis internacian festivalon de junularaj orkestroj kaj atingis la unuan lokon inter 9 orkestroj. Nia orkestro ludis ankaŭ en la solena finkoncerto.

Koncerto en la Muzik-Akademio

Jozefo Záborszky

Kaj fine, kion vi povus diri pri la pluaj planoj de via orkestra ensemblo?

Mi menciis, ke nia orkestro estas amatora. Tamen ni klopodas iomete partopreni la agadon de la profesiaj orkestroj, precipe dum somero, kiam ni ankaŭ rolas en la programo de la liberaeraj koncertoj en Budapeŝto.

Aliparte ni difinis por ni ankaŭ edukan taskon, koncerne la estontajn membrojn de la orkestra generacio. Pluraj el niaj gemembroj — post la sukcesa abiturienta ekzameno — elektas la muzikon kiel profesion kaj daŭrigas sian studon en la Muzika Ĉeflernejo. Ni estas fieraj, ke tiamaniere ankaŭ ni povas kontribui al la eduko de la estontaj muzikistoj orkestraj.

*

Ĵus antaŭ la fino de mia skribado mi partoprenis liberaeran koncerton en la Budapeŝt-a „Burgo Vajdahunyad", kie la orkestro de la gimnazio István I., kunlabore kun la kantĥoro de la sama lernejo kaj kun la solkantistoj de la Budapeŝt-a Operdomo, prezentis sur koncertpodio la unuaktan operon „Cavalleria rusticana" de P. Mascagni. El la entuziasmaj aplaŭdoj de la spektantaro evidentiĝis, ke la orkestra ensemblo de la gimnazianoj hejmece muzikas ankaŭ en la medio de opero.

István LÁSZLÓ



Lajos Kassák (1887—1967), verkisto, poeto kaj pentristo, Kossuth-premiito, estis originala kaj interesa talento en la hungara literaturo de la unua centjarduono. Li famiĝis kiel reprezentanto de socialisma, pacisma, antimilitisma tendencoj, poste kiel entuziasmulo kaj organizanto de ekspresionismo kaj aliaj avangardaj skoloj; li uzis nur versojn liberajn. La faŝismo kaj la milito igis lin retiriĝi de la publika vivo, ankaŭ pro politikaj desapontiĝoj li fermiĝis en sin mem. En lia malfrua liriko, tamen, eĉ se li ne solvas plu sian solecon, li trovas ankaŭ tonojn de sereneco.

Hodiaŭ la budapeŝta radio en ĉiuj siaj tri stacioj dissendas la komponaĵon de *Sándor Balassa:* „Rekviemo por Lajos Kassák". La komponaĵo gajnis en 1972, ĉe la *Tribune Internationale des Compositeurs*, far la senditoj de la radiokompanioj de la mondo, la distingon, ke ĝi estas elstare plej bona komponaĵo de la jaro. La rekviemo havas kiel tekston ne la kutiman „Requiem eternam dona ei, Domine", sed estas kunmetita el la poemoj de Kassák. H. V. jam publikigis de Kassák sep poemojn (1965/IV., 1975/IV.).

LAJOS KASSÁK

VOJOJ SENFINAJ

Ĉio pasas
kaj kion disportas la vento
aŭ kio fridiĝinte kaŝiĝas sub tero
tion domaĝas priplori.
Mortos ankaŭ ni
sed tiel ke en ĉiuj tempoj ni vivos plu
ŝanĝinte veston
sen memoroj
kiel ĝangaloj dronintaj en ŝlimo
kiel la steloj de la nigra ĉielo.

La parenca sorto de l'aĵoj nin prenas en
sin.

Vi estas tiu fingro
kiun ora ringo ĉirkaŭfermas
kaj gardas de la ludo de l'hazardoj.
Vojon vi trančas por vi tra l'akvopesto
al lontana celo nekonata
aŭ sidas sur benko de aĉa placeto
rigardas la turton kiu metas neston
inter frondoj de arbo.

Vi ĝin atentas
ĉar vi sentas vin ege eta kaj perdita.

Vi ne povas trankvili
ĉiam vi ekdeziras ion
kaj jen via fortuno.
Vi ne rimarkas
ke vi migras en ĉiam pli kaj pli novaj
sferoj

kaj jen via fortuno.
Ne ekzistas tia morto
kiun vi ne eltenus
ne ekzistas tia ordono
kiun vi ne scius kontraŭdiri
kaj jen via fortuno.

Ne ploru do
ne lamentu.

Tr.: K. KALOCSAY

La Rákóczi-fortikaĵo en Sárospatak — Foto: János Eifert

Tro da porka graso konsumas la hungaroj: laŭ la statistiko jare kaj persone 28 kg-ojn, dum el oleaĵoj nur 3 kg-ojn. Sed iom post iom oni komencas dekutimiĝi de tio, kaj pliiĝadas la konsumado de sunflora, kolza kaj soja oleoj. Tial la ŝtato finance helpas la kulturadon de oleodonaj plantoj, en la produktaj agrar-kooperativoj do pli kaj pli kreskas la produkto de sunfloro, kolzo kaj sojo, kaj por la prilaborado de ĉi tiuj oni estigis novajn uzinojn kun modernaj maŝinoj. Grandkvante kreskis ankaŭ la produkto — kaj konsumo — de kortbirdoj kaj de ovoj. Tial la higienistoj esperas, ke per la malpliiĝo de la konsumitaj kalorioj la meznombra korpopezo estos ĉe ni pli proksima al la ideala normo ol ĝis nun.

La pompo de barok-stilo — en la preĝejo de Tihany. Foto: J. Eifert

panoramo

*

La unuan parodontologian kuracistan konsultejon de la lando oni malfermis en la urbo Szolnok. La „parodontologio" signifas medicinon de apuddentaj malsanoj, unuavice de malsanoj dentkarnaj (gingivaj). Ĉe la malfermo ĉeestis la estraro de la Hung. Dentkuracista Asocio kaj la profesoroj de niaj kvar Medicinaj Universitatoj. En Szolnok la dentkarnajn malsanojn oni kuracas per termoakvo, kies fonto troviĝas apud la bordo de la rivero Tisza, kaj kies sintezo estas elstare konvena por la hidroterapio de la dentkarnaj malsanoj. La kuracado estas senpaga por ĉiu civitano.

*

Organizite de la Fizika Asocio Loránd Eötvös, en urbo *Balatonfüred* okazis la internacia konferenco „Neutrino '75". La esplorado de la neŭtrino estas grandsignifa; tion montras ke ĉi-koncerne rapide sekvis unu la alian kvin grandaj internaciaj konferencoj; el ili du havis sian lokon en Balatonfüred. La neŭtrino estas ekstreme malgranda elementa partiklo, havanta nek elektran ŝargon, nek magnetecon kaj tial tre malfacile detektebla. Ĝi estiĝas kaj funkcias ĉe la t.n. malfortaj interefikoj, ekz-e kiam, interne de atomo, protono enkaptas elektronon kaj fariĝas neŭtrono (ĉi tio estas unu el la procezoj, per kiuj hemia elemento ŝanĝiĝas en alian). La neŭtrino, fluganta lumrapide, povas trapasi planedojn kaj stelojn sen baro kaj ligiĝo. Laŭ *György Marx*, Kossuth-premiita akademiano-fizikisto, pasia esploristo de la elementaj partikloj, lastatempe oni malkovris helpe de la neŭtrinoj novtipajn fortojn, t.n. „neŭtrajn kurentojn". Oni konstatis krome, ke la neŭtrinoj, interpuŝiĝinte kun kvarkoj, kreas ĝis nun nekonatan formon de materio. Per sia granda trapenetremo ili povos nun informi pri lokoj, kiuj neniel alie estas observeblaj, ekz-e pri la interno de la astroj. Komenciĝas do per ili la „konfesigo" de la steloj. Ŝajnas, ke tiamaniere la ebloj de la homa ekkono fariĝas kvazaŭ senlimaj. En la Sovetunio, sub Kaŭkazo, en 1000-metra profundo konstruiĝas subtera laboratorio neŭtrin-esplora; la profundo necesas por elkribro de perturbaj faktoroj. Ankaŭ hungaraj esploristoj povos labori en tiu avantaĝa medio.

*

Drago-ŝipoj laborantaj sur Danubo ellevas el la riverfundo tertavolojn dikajn 6—8 metrojn kaj en tiuj ne malofte antikvaĵoj estas troveblaj. Antaŭ nelonge, ĉe la vilaĝo *Visegrád*, dragoŝipo levis el la rivero orpladon kun pezo de 42 dekagramoj kaj kun diametro de 22 cm-oj. En la Visegrada Muzeo, laŭ ties direktoro *Miklós Héjj*, oni jam kolektis pli ol 500 altvalorajn antikvaĵojn; ĉi tiujn la restaŭristoj jam tute purigis, kaj difinis ankaŭ tion pri ĉiu, el kiu epoko ĝi devenas. Tie estas videblaj: glavoj el la fer-epoko, ĉenoj el la bronz-epoko, keltaj kaj aligentaj glavoj, batalkrampoj, graploj servantaj por breĉi ŝipon, sabroj kaj kuprovazoj el la tempo de la jugiteco sub

panoramo

turkoj kaj multaj aliaj objektoj. La ŝipistoj ofte por horoj haltigas la dragmašinojn kaj kribras la gruzon por savi kelkajn arkeologiajn trovaĵojn. Ili faras tion ne por mono, sed laŭ kontrakto farita kun la Hungara Nacia Muzeo, en la intereso de la scienco kaj por akiri memoraĵojn de epokoj pasintaj.

*

Por geologoj-inĝenieroj trimonata perfektiga kurso de UNESCO okazis en Budapeŝto, organizite de Hungara Ŝtata Geologia Instituto, Centra Geologia Ofico kaj Budapeŝta Teknika Universitato. Partoprenis ĝin, krom la hungaroj, fakuloj el Aŭstrio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Etiopio, Ghano, Indonezio, Irako, Irano, Nigerio kaj Sudano. La oficiala lingvo estis la angla (ĉiuj partoprenantoj estis neangloj). La gvidanto de la kurso estis dro József Konda, *ĉiuj instruantoj-profesoroj estis rutinaj fakuloj. En la fina ekzameno la ekzamenatoj devis defendi sian disertacion antaŭ la ekzamena komisiono. La sukceso estis plena: ĉiu studinto akiris la internacian diplomon.*

*

La fama filozofo akademiano *György Lukács* testamentis antaŭ sia morto siajn manuskriptojn kaj korespondaĵojn al la Hungara Scienca Akademio kaj sian dekmil-voluman bibliotekon al la Filozofia Instituto. Post lia morto, en 1971, „Arkivo kaj Biblioteko Lukács" estis fondita en la Filozofia Instituto de HSA. En la iama loĝejo de la filozofo, lia laborĉambro restas senŝanĝa, en la aliaj ĉambroj, sur muraj bretoj, la sciencaj libroj verkitaj pri Lukács estas ordigitaj: 572 dikaj libroj kaj 1045 studoj en ĉiuj lingvoj de la mondo. En la arkivo troviĝas pli ol mil fotoj kaj nekalkulebla kvanto da leteroj de famaj hungaraj kaj eksterlandaj personoj. La celo de la arkivo estas helpi la filozofojn-scienculojn en la aranĝo kaj prilaboro de la grandega scienca heredaĵo de György Lukács.

*

Estas jam kutime, ke Károly Kazimir *ĉiusomere surprizas la publikon per io unika en sia „Ronda Teatro". Li surscenigis tie jam grekajn klasikaĵojn, la epopeojn Kalevala kaj Ramajana, la japanan teatron, la turkan Karagőz, la araban „Mil kaj unu noktoj"; ĉi-jare sekvis la sumera-akada epopeo* Gilgameŝ. *Certe bela kaj alloga tasko; en la pensomondo de tiuj praegaj sumeroj-akadoj, nome, oni povas malkovri ne nur prafontojn de nia kulturhistorio, sed ankaŭ niajn nunajn bazproblemojn pri vivo kaj morto, timo kaj lukto, ĉiuj konfliktoj de nia homa esto. Kaj en Gilgameŝ jam aperas la fiera, ĉiospita, diodefia konscio de homo serĉanta sian individuecon kaj konsterniĝanta pro la neeviteblo de sia morto. Tamen, la entrepreno ne estis senproblema kaj sendanĝera: ĉu prezenti la historion de Gilgameŝ en maniero de praa templa rito — kiel, onidire, ĝi estis dramigata siatempe —, aŭ kompletigi la miton, cetere fragmentan, tiamaniere, ke oni vidu, kiel la tiutempa homo vivis, krome doni lokon apud la dramaj scenoj ankaŭ al ama liriko kaj humuro, ĉerpitaj el aliaj fontoj tiutempaj. Kazimir elektis ĉi lastan eblajon. La kritiko plejparte malaprobas tiun lian elekton, asertante, ke tiamaniere la prezentado ne povis fariĝi vere granda arta travivaĵo, eĉ se ne mankis en ĝi la vere animkaptaj, fascinaj partoj, ekz-e la sceno inter Gilgameŝ kaj lia patrino.*

SZ. B. kaj K. K.



Vilaĝo Hollókő — Foto: T. Mihalik

Katedralo en Pécs — Foto: T. Mihalik



Sukcesa kongreso en Kopenhago

Pli ol 1300 partoprenantoj en vera bona etoso ĝuis la gastamecon de la dana ĉefurbo, Kopenhago, kaj la glate funkciantan kongresorganizadon. Malmultaj sed entuziasmaj, senlacaj aktivuloj preparis kaj funkciigis tiun, oni dirus familiecan kongreson.

Dum la inaŭgura festo entuziasmigis la kongresaron sinsekvaj Elingvaj salutoj de registaraj ambasadoroj (rimarkinda estas inter ili la esperantlingva alparolo de Usona ambasadora sekretario).

La artaj vesperoj sinsekve donis ravan bildon de Esperantujo, sentigis netan kaj harmonian atmosferon de internacia kunvivado. Ŝajnis, ke la kongresanaro tre rapide ekkonis unu la alian, kaj el la metropolo estis ĉie videblaj alsalutantaj verdsteluloj, ĝenerale interparolantaj en vera bona esperanto.

Sed ni havu vortojn pri la enlandanoj, do pri la danoj: Tivoli-pantomimo en itala stilo senmanke nin plezurigis. Tamen ĉefe io eksterordinara por ordinara mez- aŭ sudeŭropano estis ke Groenlanda eskimo-grupo kantis, dancis en vestaĵo polara. Tiuj ĉarmaj eskimo-virinoj, fortikaj viroj kun siaj mildaj kantoj, lantaj movoj kaptis la korojn. Ni ekkonis ion tre fortimpresan.

Vagabondulino Danielle Béguin surdorse kaj permane alportis tutan armeon da plej diversaj muzikinstrumentoj. Aŭskultante sudajn kaj nordajn ĉefe folklorajn melodiojn, oni perpleksiĝis: kiel tiu juna ĉarmulino adaptiĝis al la bravura ludkapablo regi ĉiujn ĉi? Unuvorte: plezuroj kaj miroj miksiĝis kaj eĥis aplaŭdon tondran kaj laŭdon ondan.

Tamen la kongreso unuavice estis laboranta kongreso. Aktivuloj grandnombre kunvenis, diskutis, utiligis la plurajn novaĵojn de la kongresarangxo. Somera Universitato havis lige al la prelegoj apartajn seminariojn, gvidatajn de la prelegantoj. Konkludo ĝenerala estis, ke denove venis freŝa kaj sukcesa maniero, bone funkcianta.

La Virinan Jaron nun tenatan kaj ties ideon honoris plurfacete la kongreso: la hungara estrarino drino Flóra Szabó Felső oratoris ĉe la solena inaŭguro pri la rolo de la virinoj en la movado.

Komitatanoj unuanime deklaras, ke ili forte sentas la dinamikan gvidon de la juniĝinta estraro, ties celkonscian kaj energian antaŭmarŝon — kaj jen kio ŝajnas la plej grava. Ne nur teknikaj novaĵoj montras tion. La deficito de UEA reduktiĝis, kaj por la jaro 1976 oni antaŭvidas sendeficitan kason. Multajn esperigas prave alproksimiĝo al aliaj movadoj, iamaniere homaranismaj: por kunlabori kun tiuj, interesigi ilin pri nia afero: ĉi-koncerne montriĝis kelkloke tre esperigaj iniciatoj. La fakaj organizaĵoj ricevos pli grandan signifon en nia movado: ilia plifortigo, pionirado en siaj propraj medioj — sub celkonscia akordigo de UEA malfermas novan horizonton. Internacia vastskala agado al superaj organizoj, havigi helpon de spertuloj ŝajnas bone alirebla por nia diligenta kolegaro: se ĝi ricevos celtrafan direktadon de estraro klarvida, celante ne nur solan organizaĵon, per tio la homaj fortoj jam akiros pli da energio. Refreŝiga agoforto ekmoviĝis inter la aktivularo, kaj kiam jenaj linioj vendrede naskiĝas ĉe la tajpilo, la komitato de UEA ankoraŭ fervore laboras, kaj tion ĝi faras jam de naŭ tagoj vere senlace, meritante honoron de la esperanta popolo — kaj ĝi strebas ekfini multajn detalojn por la efektivigo de la Beograda laborplano. Post la Helsinka konferenco, post ties esperigaj decidoj, por la sekureco de la mondo, por la interpopola kompreno pli bona, neniel neglekteble alviciĝas la bezono: malkonstrui la netoreleblajn barojn inter la diverslingvaj homoj. (MEM telegrame salutis el sia kunveno la Konferencon en Helsinki.)

Post unujara agado, la nova Estraro de UEA povas rigardi la estontecon kun optimismo, kaj la esperantistaro kun harmonia entuziasmo.

Ervin FENYVESI

Al ĉiuj esperantistoj

Kiel oni povis sperti, en la lastaj jaroj ni komencis doni ian indan interesan karakteron por ĉiuj numeroj de nia dumonata revuo, Hungara Vivo. La leteroj, opinioj de niaj enlandaj kaj eksterlandaj legantoj atestas, ke ili akceptis ĉi tiun planon favore, ĉar oni ĉerpadis bone el la numeroj de HV — ekzemple — ĉe klubkunvenoj, prezentadoj, lingvopraktikado, informado por vojaĝo ktp. Ni povas do rekomendi al ĉiuj esperantistoj:

1971/3 — numero
pri K. Kalocsay
1972/4 — n. pri
Literatura Mondo
1973/1 — n. pri
Sándor Petőfi, poeto
73/2 — n. pri
Gyula Illyés, poeto
73/3 — n. pri
Budapeŝto
73/4 — n. pri
Sándor Szathmári, verkisto
1974/1 — n. pri
la originala Esperanto-prozo
74/2 — n. pri
Hungario kiel inda turisma celo
74/3 — n. pri
la originala Esperanto-poezio
74/4 — n. pri
la hungara ekonomia vivo
74/5 — n. pri
la originala Esperanto-dramo
74/6 — n. pri
la hungara scienco
1975/2 — n. pri
la liberiĝo de Hungario
75/3 — n. pri
la esperanta gazetaro
75/4 — n. pri
Mór Jókai, granda hungara verkisto
75/5 — n. pri
Lajos Tárkony
75/6 — n. pri
Ferenc Szilágyi
1976/1 — n. pri
József Lengyel, verkisto
76/2 — n. pri
la problemoj de la scienca fikcio
76/3 — n. pri
la eldonado de esperantaj libroj
76/4 — n. pri
la hungara popolarto
76/5 — n. pri
la arttraduko kaj Esperanto
76/6 — n. pri
la hungara filmarto

Hungara Vivo jam dum lastaj jaroj — ni kuraĝas diri — estas ne nur revuo de *hungara vivo*, sed ankaŭ la plej ampleksa revuo de internacia lingvo kaj la originala Esperanto-literaturo.

Se Vi jam abonas nian revuon, bonvolu rekomendi al viaj amikoj, tiamaniere Vi povos apogi nian helpindan laboron. Numerojn aŭ ne kompletajn kolekciojn el la supraj ankoraŭ ni povos sendi laŭ mendo.

Redakcio

CHINOIN GÉPGYÁR



fabrikas maŝinojn taŭgajn por strikta pakado
de individuaj kaj kolektivaj pakaĵoj
Se vi havas tiurilatan interesiĝon bonvolu kontaktiĝi kun

HUNICOOP Gépipari Kooperációs Külkereskedelmi Iroda

Maŝinindustria Koopera Kontoro por Internacia Komerco **HUNICOOP**

Ĝi estas volonte je via dispono:

HUNICOOP

H—1062 Budapest, Népköztársaság útja 113.
Telefon: 424-950
Telex: 22-4435

D-ro László Ferenc

Rezervado de akvo en Hungario

De pratempoj la homo luktadas kontraŭ la fortoj del' naturo. En tiu batalo ĉiam havis elstaran rolon la luktado por kaj kontraŭ la akvo. Oni devis sin ŝirmi jen kontraŭ la senbridaj detruoj kaŭzataj de la inundoj de riveroj, riveretoj, jen kontraŭ langvoriga sekeco. Tiu duopa lukto instigis la homon jam antaŭ mil jaroj konstrui diversajn akvo-instalaĵojn parte por ŝirmi siajn valorajn posedaĵojn kontraŭ difektoj far la inundoj, parte por ke oni povu estigi rezervojn por la senpluvaj tempoj. Rilate ĉi lastan la akvorezervujoj havis gravan taskon jam en la paseo, kion konvinke pruvas, ke ekzemple en Cejlono jam en j. 5000 a. K. estis konstruitaj artaj rezervaj lagoj, krome atestas indikoj, ke jam en la antikva erao kreis tiajn instalaĵojn la egiptoj — majstroj de la akvokonstruadoj, kaj simile la grekoj kaj romianoj. Estas legeble ankaŭ en notoj de Herodoto, ke en la antikva tempo la egiptoj rigardis la lagon *Moeris* unu el siaj plej grandaj kreaĵoj. La historiisto tiel sciigas pri tio: „*Se ni taksas miraklo la labirinton konstruitan sur ĝia bordo, tiam ni povas preni centobla miraklo la lagon Moeris mem. Ĝia periferio estas 360 stadioj, t. e. tiom, kiom la longo de la Egiptia bordo* ... kaj ĝia plej profunda loko estas kvindek klafta. (pr. 6,5 km-ojn longa kaj 100 metrojn profunda). Estas tuj rimarkeble, ke ĝin konstruis homaj manoj ... la lago ricevas sian akvon ne el fonto (ja la tuta regiono tie estas ege malriĉa je akvo), sed ĝin nutras la rivero Nilo tra kanalo. *Dum ses monatoj fluas la akvo el la Nilo en la lagon, poste dum ses monatoj reen en la Nilon.*" Laŭ tio iam en *Fajum* — sur unu el la plej fekundaj regionoj de Egiptio — ekzistis tia akvorezervujo, kiu ensorbis la inundaĵon de Nilo kaj dum la tempo de malalta akvonivelo redonis la akvon al la valo de Nilo, kaj tiamaniere ĝi ebligis la irigacion de la deltoregiono.

Ankaŭ en Jerusalemo mankis la necesa akvokvanto, tial konstruigis reĝo Salomono novan ak-

Lago ĉe Arló



Farita lago ĉe Égervölgy, Pécs

vokondukilon. Jene li fanfaronadis: „*Mi pretigis por mi akvorezervajn lagojn, ke mi el ili irigaciu la ĝerman forton de la arboj.*" Tri tiaj lagoj ekzistis kaj tiuj kolektis la fontakvon de du valoj inter la montetoj de Judeo. El tiuj lagoj portis la akvon tri akvokondukiloj al *Jerusalemo, Bet-Leĥem* kaj *Herodeion.* La Romia Imperio konstruigis akvorezervujojn ankaŭ sur teritorioj de Hungario. Tiel ekz. en la regiono de komunumo *Pátka* per la ŝveligo de la rivereto *Császárvízpatak* (rivereto „Imperiestra") — kiel ni povas konkludi el la mezuroj de la ruinoj — la Romia digo estigis proksimume tiel grandan artan lagon, kia en nuna tempo konstruiĝis 2—3 km-ojn supre sur la sama rivereto *Császárvízpatak* por la kompletigo de la akvo de lago *Velencei-tó.*

Similan valbaraĵon ni konas ankaŭ en departemento *Veszprém.* Verŝajnas, ke konstruiĝis krom tio pluraj similaj verkoj en tiu tempo sur teritorio de Panonio, ja tiu spaco estis unu el la signifaj centroj, gravaj nutroprovizejoj de la agrara ekonomio de Romio.

El tiuj ekzemploj videbliĝas, ke ankaŭ homoj de la antikva kaj mezepoka eraoj atribuis grandan signifon al la akvorezervujoj.

La rezervujoj servos foje por irigacio, alifoje por la trinkakvo-provizado, aŭ poste por la funkciigo de muelejoj, la fiŝbredado, ktp. — la fina celo estis ĉiam la estigo de tia arta lago, en kiu oni povis teni la akvon ĝis la tempo de ekuzo, — ĉar tio estis la plej evidenta defendo kontraŭ la malfavora dividiĝo de la akvoprovizo.

Priatentante tiun cirkonstancon, ke la akvobezonoj saltmaniere kreskas, la signifo de akvorezervado pliiĝas tutmonde.

Tiel estas ankaŭ en nia patrio, eĉ ties gravecon pravigas ankaŭ tio, ke en nia patrio estas ekstreme malfavora ne sole la teritoria, sed ankaŭ la tempa dividiĝo de la akvokvantoj. Sen rezervado estas utiligeblaj nur bagatelaj kvantoj de la akvoprovizoj fontantaj sur tereno de la lando. Tial — por certigi la pluan ekonomian evoluon — sur terenoj malproksimaj de la grandaj riveroj nepre necesas ia kompletigo de akvoj, unuavice per konstruo de akvorezervujoj. La hodiaŭ ankoraŭ libera akvokvanto de la grandaj riveroj estas alproprigebla sole per akvotransportado kaj per la akvorezervujoj aliĝantaj al ili. Krome la rezervujoj signife malpliigas la mezurojn de la akvotransportaj, akvoprovizaj instalaĵoj.

La akvorezervadon ni taksas la plej grava forta homa interveno en la naturan cirkuladon de la akvoj. Tial la akvorezervado en Hungario leviĝis je granda signifo nur en nunaj tempoj — sekve de la impeta ekonomia evoluo de la postkvindekaj jaroj.

Oni povas ebligi la akvorezervadon per rezervujoj en mont- kaj montet-regionoj, laŭ sistemoj de valfermaj digoj aŭ akvonodoj de longaj talusoj, krome en lagoj de ebenaĵaj areoj. La kons-



Farita lago ĉe Lázbérc

Farita lago ĉe Hárságyi

Farita lago ĉe Dombai



truado de ĉi lastaj estas tre multekosta, kaj tial en nia lando sur la Granda Ebenaĵo nuntempe estiĝas preferata la malpli kosta rezervado sur areoj akvoondaj de la akvonodoj sur rivero Tisza.

La akvorezervado servas diversajn popolekonomiajn interesojn. En rilato Hungarlanda ĝi havas grandan signifon ĉefe en la kontentigo de bezonoj de akvoprovizado, de irigaciado kaj de lagomastrumado.

En plimulto de la kazoj sur montetaj teritorioj estas formeblaj negrandaj akvorezervujoj, do iliajn irigaciajn eblecojn oni devas utiligi sur la plej favore situantaj terenoj de granda fekundeco, per kultivado de intensivaj plantokulturoj, alportantaj plej grandan profiton pro utiligo de la irigacia akvo. El tiuj proprecoj devenas la „oaza" karaktero de la montetregiona irigacia mastrumado.

En Italio sur la irigaciataj oazoj de montetregionoj la plej oftaj irigaciataj plantokulturoj estas la vitoj, diversaj fruktoj kaj la oleoarboj. El la plantoj de ne ligneca tigo oni irigacias ĉefe la diversajn legomojn kaj furaĝojn. Simila estas la situacio en Bulgario. En Ĉeĥoslovakio preskaŭ ekskluzive nur la legomoj kaj furaĝoj estas irigaciataj.

En nia patrio nun estas formiĝantaj la irigaciendaj oazoj de montetregionoj. Ankaŭ ĉe ni validas la tezo, ke el la rezerv-akvoj oni devas irigacii en plej alta proporcio la plantojn alportantajn plej intensan kaj plej grandan profiton. La irigaciado de eksluzive plugkampaj plantoj — do sole de rastrendaj furaĝoj, industriaj plantoj aŭ cerealoj — plej ofte ne alportas kontentigan lukradon, se tio okazas el akvorezervujoj. La akvo kolektebla el pli malpli grandaj rezervujoj estas granda trezoro, kies ĉiun guton oni devas destini por la plej multvaloraj plantokulturoj.

La irigaciendaj plantokulturoj estas tiel elektendaj, ke oni priatentu la kultivajn tradiciojn de la pejzaĝo kaj la debiteblecojn. Tiel estas evidente, ke en vit- kaj vinregionoj, respektive en ties proksimeco, la irigaciadon de la vitgreftaĵejo oni devas meti centra tasko de la irigacia kulturado. Kontraŭe en regionoj de legomaĵplantoj aŭ fruktarbejoj la ĉefan direkto-linion oni devas formi al la irigaciata legomkultivado — eble al produkto de fruaĵoj —, aŭ al irigacio de fruktejoj.

La akvorezervujoj havas grandan rolon ankaŭ en la malpliigo de la inundo-danĝero. Nome por la iom malgrandaj akvokolektaj teritorioj prezentas grandan danĝeron la impetaj, intensaj pluvegoj; la akvoj kolektiĝantaj dum mallonga tempo povas kaŭ zi signifajn damaĝojn sur la suba etapo de la akvoelfluejo. La rezervujo en malplena stato povas eble akcepti la tutan akvokvanton de pluvego. En okazo de nur parte plenigita ujo ĝi malpliigas la danĝeron de inundado de la terenoj pli subaj. Ĝi malpliigas la danĝeron de la rapideco de akvo-forfluado eĉ en plenigita stato, ĉar la valfermaj digoj por certigo de la sekureco povas reteni akvokolonon minimume en alteco de 0,50 metro sur tuta tereno de la rezervuja aero. Per

Lago ĉe Pécs



Lagoj ĉe Abaliget

la reteno de la inundomaksimumoj seniĝas parto de la malsupraj teritorioj disde subakviĝo.

Krom ĉi tiuj taskoj de la akvorezervujoj, ĉi artaj lagoj kreitaj de homoj havas gravan rolon en kontentigo de bezonoj por refreŝigo, sporto, turismo. Ĉi tiuj lagoj iĝas efektivaj perloj de tiuj pejzaĝoj kaj per sia magia ĉarmo magnete altiras la homon ŝatantan la naturon, dezirantan refreŝigan ripozon. Ne estas do mirinde, ke tutmonde fortiĝas la deziro, ke krom la ekonomia utiligo de la akvorezervujoj estu ebleco por tiaspeca profitigo.

La eblecoj por akvorezervado en Hungario estas relative modestaj pro la montarreliefaj dispozicioj. Per tio estas klarigeble, ke antaŭ la kvindekaj jaroj en nia lando estis entute nur sur 16 lokoj akvorezervujoj de negranda kapacito, kiuj sume havis nur iom pli ol du milionojn m^3 da rezervuja volumeno kaj lagosurfacon de pr. 190 katastraj arpentoj. El tiuj malgrandaj rezervujoj la plej malnova estas la lago *Hámori-tó*, kies surfaco estas 14 arpenta kaj la profundo 5 m-a. Ĝi formiĝis per la barajo de valo de rivereto *Garadna* apud kastelo *Lillafüred* komence de la pasinta jarcento, eĉ ĝia unua ferm-digo estiĝis fine de la 18-a jc.

Lagoj ĉe Sályi

En lastaj jaroj — en signo de moderna akvomastrumado — konstruiĝis pli kaj pli akvorezervujoj en nia lando. En j. 1965 krom la pli fruaj malgrandaj rezervujoj ni registris jam 89 rezervujojn, kiuj havis rezervadan volumenon de 60 milionoj m^3 kaj akvospegulon de 6900 arpentoj. Je la fino de 1975 la rezervuja kapacito kreskis ĝis 550 milionoj da m^3. En la unua tempo estis konstruitaj rezervujoj ĉefe por agrara akvoutiligo, sed en la pasinta jardeko kreskis la nombro de la rezervujoj servantaj la kontentigon unuavice de la bezonoj de industrio aŭ de trinkakvo. Tiaj estas ekz. la rezervujoj Rakaca, Lázbérci, Köszörűvölgy, ktp.

Laŭ vidpunkto de grandigo de la rezerva volumeno havas tre grandan signifon la akvonodo ĉe *Kisköre* (la dua sur rivero *Tisza)* Ĝi ekfunkciis en 1974 kaj povas rezervi 300 milionojn m^3 da akvo. Sur la 40 km-ojn longa etapo de la rivero inter *Kisköre* kaj *Tiszabábolna* formiĝis rezervuja spaco, kies surfaco estas 127 km^2, do kvinono de la areo de lago Balatono. Tiu rezervujo havas kompleksan destinon: unuavice ĝi servas celojn agrarajn kaj industriajn, sed la ĉi tie kolektiĝanta akvo — krom diversaj aliaj utiligoj — havas gravan rolon por kontentigi bezonojn de refreŝigo kaj sporto.

Inter la lastjaraj ekfunkciigitaj rezervujoj specialan rolon havas la rezervujoj ĉe *Pátka* kaj *Zámoly*. Nome ties primara destino estas, ke ili devas doni sufiĉan akvon por certigi la nivelon favoran de lago *Velencei-tó* per la kolektado de pluvoj kiuj atingas la terenon de la akvo-alfluejoj.

Nome la akvonivelo de la lago estas varia. La diferenco inter la du ekstremaj akvoniveloj de la aprila maksimumo kaj de oktobra minimumo estas 170 cm-oj. Tiu ĉi granda „akvoludo" estas en iuj tempoj same malavantaĝa por la agrikulturo, la kanproduktado, la fiŝkaptado kaj por la evoluado de la apudlagaj somerumejoj. Ĉe malalta akvonivelo malpliiĝas la oksigen-enhavo de la akvo, kio minacas per pereo la fiŝ-etaton, kaj ankaŭ la kano ne kreskas kontentige. La malalta akvonivelo estas favora por la plimultiĝo de la kuloj. Ĉe alta akvonivelo subakviĝas la kulturitaj kampoj kaj la somerumadaj regionoj, krome tio malfaciligas la trančadon de la kanoj kaj la rikoltitajn kankonusojn superondas la akvo. Simile, kiel ĉe Balatono, kie la kultureca, organizita refreŝiga vivo povis komenciĝi nur post la reguligo de la akvo, — ankaŭ ĉe lago de Velence estas unu el la plej gravaj taskoj por konstantigi la akvonivelon.

La akvorezervujo ĉe *Zámoly* pretiĝis en 1970. Ties tasko estas krom akvokompletigo pro la someraj vaporiĝaj perdoj, la reteno de la inundoj venantaj tra la rivereto *Császárvíz*. Somere de j. 1975 estis transdonita por sama destino ankaŭ la rezervujo *Pátka*. Per la ekfunkciigo de la akvorezervujo de Pátka estas certigita la optimuma akvonivelo de lago *Velencei-tó* kaj eĉ okaze de plej seka tempo ne minacas tiun belan lagon la danĝero de senakviĝo.

Tr. Alfonso Pechan

Lajos Tárkony

REVUO DE REVUOJ

SCIENCA REVUO (Vol. 24. numero 5) publikigas de *Marjorie Boulton* altire, kvazaŭ fascine interesan artikolon pri metaforoj kaj pensasocio. Tre akravide ŝi demonstras, kiel la pensasocioj povas diferenci ĉe diversregionanoj eĉ koncerne tiajn simplajn vortojn kiel *suno, pano, filo* (kaj ŝi iom malesperigas per tio la poeton, kiu havas la iluzion, ke en E-o li povas verki por la tuta terglobo). Majstraj estas ŝiaj analizoj de kelkaj E-aj poemoj. Ankaŭ la artikolo de *St. Gaska* pri matematiko de Nikolao Kopernik estas surprize ineresa eĉ por matematiko-fobiulo, almenaŭ ĝis la lastaj du paĝoj dronantaj en trigonometrio. *M. Demianski* en „Nigraj kavoj aŭ kiel mortas steloj" informas pri komuninterese ekscita ĉapitro de la moderna astronomio.

En LITERATURA FOIRO (jaro 6. numero 29) interesis min de *Giorgio Silfer* „Dramoj el germana konsumismo", en kiu li raportas pri la dramoj de *F. X. Kroetz*. Ĉi tiu en siaj verkoj. priskribas la ŝajne aktivan, sed reale pasivan ekzistadon de manipulitaj „konsumantoj". — El la poemoj de *G. Gimelli* plej plaĉis al mi „Pluvo kaj memoro" kun sia kormolige larmofonta rememor-nebulo. — *Carlo Minnaja* verve aprecas *B. Ragnarsson* ankaŭ okaze de tio, ke de nun li prezidos juĝantaron de la Belartaj Konkursoj. *G. Silfer* faris interesan intervjuon en La Chaux-de-Fonds, bedaŭrinde, mi ne scias kun kiu. Nek en la intervjuo, nek en la enhav-tabelo nome la intervjuito estas nomita. Li estas cetere tre severa homo, diras ekzemple: „Plena Gramatiko fakte miksas la priskribon kaj la preskribon de la lingvo, nome kiel E-o estas kaj kiel plaĉus al akademianoj Kalocsay kaj Waringhien." Tion mi ne subskribas: la libro ja estas plena de zamenhofaj ekzemploj kaj kiam la aŭtoroj mem proponas ion, ili diras tion eksplicite. El la E-gazetoj al multaj li deziras morton. Ankaŭ ĉikoncerne mi estus malpli sangsoifa. Fakte, mi mem jam plendis pri aspekta kaj enhava kompatindeco de pluraj revuotaĵoj. Tamen, ni pripensu, ke tia gazeteto havas redaktoron, kunlaborantojn, helpantojn ktp. kaj ĉi tiujn ĝuste tiu organeto kroĉas al E-o eble pli intense ol io ajn alia. Kaj ni bezonas tiajn kroĉilojn, kiuj malpliigas la transirdoman karakteron de nia movado. La intervjuato plendis pri tio, ke nenian informon li povas ricevi el la E-gazetoj. Tial mi atentigas lin, ke ekzistas presaĵo tre informriĉa: PILO-PRESS.

Jes, ĉar en la kajeroj de PILO-PRESS la nelacigebla *Ludwig Picker* en Nürnberg kolektas kun formika diligento ĉiujn informojn, artikolojn, eventojn, interesaĵojn, kiuj rilatas E-on. La buntecon de liaj informoj mi ilustru per kvar el ili: raporto pri la stato de E-o en Brazilio; E-o en la radioj; malfermo de Esperantista Restoracio; miro de 90-jara pola esperantisto pri tio, ke *A. Pettyn*, la populara redaktoro de la Varsovia Esperanto-dissendo, ne portas Zamenhoffasonan barbon. Mi deziras longan vivon al PILO-PRESS kaj al ĝia eldonanto.

Ĉe la lego de SENNACIULO (1975. n-roj 5 kaj 6) mi kelkfoje frotetis al mi la okulojn: kio do, ĉu mi legas socialisman gazeton? La gvidartikolo de *Rihter* „Socialista strategio" elspiras sanan marksismon. Ĝi diras: „La supozo, ke reformita kapitalismo povas daŭre kontentigi laboristojn, estas iluzio kaj falo en naivan social-romantikon, la kapitalismo neniam povas ŝanĝi sian karakteron. Reformoj, kiuj povus eviti revolucion, devus esti *esencaj*, do kapablaj ŝanĝi la socian strukturon. Esencaj reformoj signifas revolucion." Poste li skribas „Povas okazi, ke laborista partio agas kvazaŭ kuracisto ĉe mortlito de la kapitalismo. Fine li konstatas, ke revolucio ne povas sukcesi sen la helpo de la amasoj. Individuoj povas krei strategiajn leĝojn, sed batali devas la laboristoj mem. — *A. Mildwurf* priskribas kun multa simpatio siajn favorajn impresojn pri Jugoslavio. Kaj eĉ pri la ekonomiko en Hungario troviĝas artikolo, kiu retrovas en ĝi „la ideon de socio malpli burokrata, pli elasta". — *Petro Levi* informas pri la „libereco" en la t.n. libera Vjetnamio. Ĝojinde, ke tiu artikolo, dank' al la heroeco de la vjetnama popolo, dume fariĝis malaktuala.

En OOMOTO (1975. 1—2.) ni trovas el la plumo de *Kiotaro Degući* artikolon pri la persekutoj kontraŭ OOMOTO kaj ĝia fondinto, la avo *Onisaburo Degući*, kaj pri la granda sukceso, kiun la artaj vazoj de *O. Degući* rikoltis en Parizo. *T. Nakamura* tradukis ankaŭ kelkajn belajn tankaojn de Onisaburo. *K. Matuba* okupiĝas baze de multaj kolektitaj ekzemploj pri la demando, ĉu uzi „sekvanta", „sekvinta", „sekvonta" aŭ „sekva". Mi voĉdonas por la lasta.

HOMO KAJ KOSMO (1975. 2.) ĝojigas per sia bela aspekto, kun plaĉa portreto de la planedo Saturno sur la kovrilpaĝo. Interne d-ro *J. Kovaĉević* (Zagreb) okupiĝas pri la superloĝateco de la Tero, konkludante, ke la ĉefa danĝero estas ne la nutraĵ-manko, sed la poluiĝo de la homa medio. La artikolo de *Veltmann* pri magnetkampoj de astroj ŝajnas tro faka, ĝis oni komencas ĝin legi, sed poste baldaŭ fariĝas interesega por ĉiuj, kiujn altiras la sekretoj de l' universo.

L'ESPERANTO estas ekstere serioz-aspekta gazeto aperanta en Milano. Bedaŭrinde interne ĝi estas negutenberga kaj pallitera. Mi notu nomon de *Anton Dega:* laŭ siaj rimportretaj rondeloj kaj siaj recenzoj li montras sin talentulo, pri kiu ni povas flegi belajn esperojn.

La gazeto INTERNACIISTO jubilinde pliampleksiĝis kaj ĝia enhavo estas pli riĉa, varia kaj konvinka. Ni esperas, ke plu evoluinte, ĉi tiu gazeto, aperanta en *Wien* (Austrio), plenigos senteblan mankon kaj fariĝos valora E-a pres-organo de la scienca socialismo.

ESPERANTO de UEA (n-ro 6) enhavas multon legindan. *M. Delcourt* kaj *J. Amouroux* priskribas interesveke la vivon de *Paul Berthelot*, okaze de ties 70-a jardeveno, ke li fondis la revuon „Esperanto" (ĉi tiun poste *Hodler* transprenis kaj faris el ĝi organon de UEA). Kurioza estis tiu vivovojo de homo talenta, multflanka, ekstremema, kiu fine mortlace serĉis azilon en klostro; oni povus pri ĝi verki fascinan romanon. *B. Ragnarsson* konigas en artikolo ilustrita per pluraj belegaj bildoj sian landon Islando, kie okazos la Universala Kongreso en 1977. Ĝojiga novaĵo estas en nia kriza tempo, ke la kapitalo de la *Institucio Hodler* pasintjare atingis la sumon de 33 000 guldenoj. De *S. K. Neumann*, glora ĉeha poeto kaj esperantisto ni trovas poemon en la traduko de *J. Korzinek*. Mi bonvenigus ankaŭ pli da literaturo en la revuo, konsidere ke literatura revuo mankas al ni aktuale.

Interesaj notoj el la gastlibro de la Mondasocio de Hungaroj

Svjatoslav Riĥter soveta fortepian-artisto.

La situo de Budapeŝto estas por mi iaspeca geografia miraklo. Mi komprenas la poetojn, komponistojn kaj pentristojn, kiuj tiomfoje kaj tiel multspece prikantis kaj pentris ĝin.

Marina Vlady franca filmaktorino.

Mia filmrolo vokis min veni al Hungario. Ĉar mi devis roli ankaŭ en provinco, mi havis okazon sidadi ankaŭ en etaj domoj de kamparanoj, plezuri en la laboro de la brodistinoj. Mi renkontis en vilaĝoj kaj urboj ĉie la laboreman, pacaman hungaran popolon. Ili gajnis mian simpation por ĉiam.

Gina Lollobrigida itala filmaktorino.

Mi konvinkiĝis persone pri tio, kiel belega estas Budapeŝto, kiel afablaj, gastamaj estas ĝiaj loĝantoj.

Günter Grass verkisto de FRG.

La interesiĝo, kion mi spertis rilate la literaturon, estas unika. Por verkistoj — ĝuste pro tiu interesiĝo — Hungario estas vera paradizo, sugestanta krean laboron.

Aram Haĉaturjan soveta komponisto.

Mi admiris la hungarajn baletartistojn jam okaze de ilia gastrolado en Moskvo. Dum la Budapeŝta debuto de mia baleto „Spartacus" pruviĝis, ke la baletensemblo de la Hungara Ŝtata Operdomo atestas pri grandioza teĥniko kaj belega mov-kulturo.

Aram Haĉaturjan kun Zoltán Kodály

Gina Lollobrigida en hungara bluzo

Victor Vasarely franca pentroartisto.

De jardekoj mi ne renkontis ĉi tiun landon, kie mi naskiĝis. Poste mi komencis studi ĝin dum longdaŭra tempo, inter aliaj ankaŭ tiun terenon, kie mi kreis. Tie mi trovis veran fontanon de elstaraj talentoj. Kiu eksterlandano estas impresiĝema al la belartoj, tiu povas senti sin en Hungario kiel en la rolo de la malkovrinto Kolumbus.

Marcel Marceau franca pantomim-artisto.

Mi trovis en Hungario mirindan muzean riĉecon, vizian folkloron, multegajn eruditajn homojn. La inklino al la novaĵoj surprizis min, krome la alta nivelo kaj rapida takto de la artisma vivo.

F. A. Bicknell
estrarano de la Komerca kaj Industria Ĉambro de Londono.

Mi ĝojas eksterordinare, ke dank' al miaj negocaj kontaktoj mi povis konatiĝi kun la kuriozaĵoj, vidindaĵoj de Budapeŝto. Aparte ni ĝojas pro tio, ke oftaj okazoj troviĝas por mi ripete reveni ĉi tien.

Albert Goldman, turistika redaktoro, USONO.

La afabla sinteno de la homoj en Budapeŝto estas la plej agrabla por mi. La junuloj estas komplezaj, ĉarmaj.

Brynjulf Bull, urbestro de Oslo.

Estas estiminde, ke oni ne malkonstruas la konstruaĵojn senpripense, eĉ de sur la tre dense loĝataj terenoj de la ĉefurbo, sed oni prefere restaŭras, kio gardas la karakteron de la urbo. Bela ekzemplo de la kombino de la malnovaj kaj modernaj elementoj estas la novlinia Elizabet-ponto kaj la preĝejo, entenanta arkaikajn elementojn, ĉe la pontkapo de Peŝt.

Trad. István LÁSZLÓ

Jam 18-jara estas la infanurbo en la vilaĝo Fót

Proksime al Budapest estis iam en la mezo de 40-hektara praparko granda, magnata, luksa kastelo. Inter la pinarboj kaj platanoj staras artaĵa preĝejo, perfekta pli malgranda kopio de fama katedralo „Notre Dame" en Parizo. Iam la aristokratoj dancis valson en la brila dancejo, flustris la nigraj frakoj kaj koloraj silkvestoj.

Poste venis la dua mondmilito, dekmiloj da infanoj orfiĝis, multe da infanoj perdiĝis, vagadis inter la ruinoj. La ŝtato lokumis ilin provizore en diversaj konstruaĵoj kaj nur magre povis zorgi pri ili.

Ĉirkaŭ la malnova kastelo, dum jaroj leviĝis novaj modernaj pavilonoj: kontordomo, ĝenerala kaj meza lernejo, laborejoj, knabo- kaj knabinkolegioj, pedagogdomoj, infanĝardenoj, sanitara domo, naĝejo, sportejoj, lago por boatado, subĉiela teatro, ludplacoj por 3—18 jaraj infanoj kaj junuloj.

La infanurbo formiĝis la 15-an de novembro en 1957 kun cent infanoj kaj 40 edukistoj. En 1962 jam estis tie 920 infanoj. En la hospitalo konstruigita de la Hungara Ruĝa Kruco en 1958—59 estas 17 hospitalaj ĉambroj kun 62 litoj. La medicina instalaĵo estas la plej moderna. Prezentiĝas la problemo, kiel estiĝis tie ĉi la infanparadizo? Jen la respondo: Helpis la ŝtato kaj la socia kunlaboro per mono kaj senpaga memvola laboro.

La ĉi tie vivantaj infanoj grandparte ne konas siajn gepatrojn, eĉ tie ĉi ricevis sian nomon kaj tie ĉi estis matrikulitaj laŭ nomoj elektitaj. La ĉefa celo de edukistoj estas tio, ke ili anstataŭigu la varmon de familio per komprenema amo, kaj ke ĉiu infano rigardu frato la alian. La pli grandaj junuloj helpas la malgrandajn infanojn. Por la disvolviĝo de la personeco doniĝas multe de ebloj.

Ĉiu infano povas trovi lokon en diversaj artaj grupoj, ĉar ekzistas orkestroj, ĥoroj, dancgrupoj, grandega biblioteko kun palmoj. Ekzistas infanoj, kies gepatroj vivas en sufiĉa bonstato, tamen tute ne volas kunporti, eĉ viziti siajn infanojn, ĉar ili eksedziĝis kaj aparte havas aliajn gefilojn. Multaj el t.n. patronaj gepatroj vizitas ofte la forlasitajn geknabojn kaj dum la kristnaskaj festoj kaj aliokaze vizitas kaj invitas ilin en veran familian rondon por forgesigi la mankon de propraj gepatroj.

Ekde trijara aĝo en sincera, rekta etoso estas edukitaj la junuloj. En la socio de infanurbo oni dividas la problemojn kaj ĝojojn kun la pedagogoj kaj kunuloj. Poste ili adiaŭas kaj elpaŝas en la eksteran vivon. Antaŭ ol ili forlasas la „Alma Mater" (latine = bona-nutra patrino; la estintaj studentoj nomas tiel la forlasitan lernejon), ili jam estas abiturientoj aŭ faklaboristoj, instruistoj kaj ofte ili restas en la infanurbo kiel dungitoj.

Menciinda estas unu grava problemo en la ekstera vivo; en la infanurbo ili kutimiĝis al la senzorga vivo, al la konstanta helpo, kaj la kruda vivo estas tute alia. Multe da personoj ŝanceliĝas kaj petas la helpon kaj konsilon de la „Alma Mater". Se ili geedziĝas, ili kun granda amo edukas la gefilojn, ili klopodas doni tiun gepatran amon, kiu mankis por ili en la vivo. La antikva kastelo jam estas nur unu parto en la grandega urbo de amo.

Antaŭ nelonge la direktoro de la infanurbo dr-o Lajos Barna rimarkis, ke en la kolonio de detruotaj aŭtoj atendas tiaj mikrobusoj (malgranda aŭtobuso), kiuj trafikis sur la Margaret-insulo. Li skribis leteron al la direktoro de Aŭtokomerca Entrepreno kaj petis lin, ke la entrepreno vendu du uzitajn mikrobusojn malmultekoste al la infanurbo kaj ili mem riparos tiujn por trafikigo en la parko de la infanurbo en Fót. Kiam la laboristoj ĉe la Aŭtokomerca Entrepreno — kiuj ankaŭ patronas la infanurbon — ekaŭdis la planon, tri socialistaj brigadoj, nome Ast-Rocskó-Dofka, tuj akceptis la taskon tute renovigi la du mikrobusojn kun po du postvagonoj. La brigadanoj unue faris dum kelkaj dimanĉoj kromlaboron kaj kolektis tiom da mono, kiom sufiĉis por aĉeti la uzitajn veturilojn. Poste sekvis la granda, senpaga laboro por ŝanĝi ĉiun eluzitan konsistparton de la veturiloj.

La granda donaco jam estas preta kaj la renovigitaj kaleŝaĵoj brilas tiel bele kiel la okuloj de la infanoj mikrobusantaj en la parko kaj kiel la eterna homa amo helpanta la sortpelatajn geknabojn.

Szilárd BÁLINT



Turoj en Nyírbátor

ENKETO DE HV

Marinko Gjivoje, Zagreb, Jugoslavio

M. Gjivoje, en sia kontribuo por nia enketo, en ties unua parto, informas nin pri la stato de la E-gazetoj kaj bultenoj aperantaj en Jugoslavio. Ili estas „Homo kaj Kosmo", „Voĉo" (anstataŭ „Suda Stelo"), „Jugoslavia Fervojisto", „Juna Ambasadoro" (junulara), „Jes, sed" (studenta gazeto Zagreba), „Scienca Revuo" (de ISAE), „Esperanto informacije (Ljubljana), „Heroldo" (Ljubljana), „Relo" (Nis), „Bulteno" (Vojvodina). Ankaŭ aliaj ambicias eldoni modestajn bultenojn.

El tiuj, „Homo kaj Kosmo" ne havas problemojn; ĝi ricevas subvencion de respublika instanco, havas pli ol mil abonantojn. Malfacilaĵo estas, ke el kelkaj orienteŭropaj landoj ne estas eble ĝiri la monon.

„Voĉo", monata gazeto, aperanta en Borovo, estas tutjugoslavia informilo, kun multaj kunlaborantoj, en bona redakto de Adnadj, nepre bezonata, sed pene vivanta, sen subvencio. Ekzistas promesoj pri apogo fare de unuopaj E-ligoj.

M. Gjivoje ne mencias „Scienca Revuo", sed pri ĝi jam parolis *d-ro B. Popoviĉ,* ĝia redakoro.

Laŭ la opinio de *M. Gjivoje,* anstataŭ la menciitaj 10 gazetoj-bultenoj-informiloj estus preferindaj nur 6. „Voĉo" estus preferinda kiel unu centra informilo.

Pri nia hodiaŭa gazetaro *M. Gjivoje* opinias jene: „Apud la plej gravaj kaj bonaj (Heroldo de E-o, Esperanto de UEA) kaj krom fakaj revuoj (Scienca Revuo, Homo kaj Kosmo, Internacia Pedagogia Revuo), kiuj estas ne sole Eŭropaj sed tutmondaj, universalaj, terglobaj, ni bezonus kaj devus havi en la landoj kun pli forta movado informilon presitan, kia estas ekz-e „Budapeŝta Informilo", la plej bone kaj interese redaktita kaj teknike aranĝita informilo, kiun mi vidis en la lastaj jaroj (mi pensas precipe pri la n-ro 2/1975 havata antaŭ miaj okuloj). Se iulanda movado ne estas ankoraŭ forta, ĝi povas eldoni nur modestan bultenon, kiu cetere respegulas la povojn financajn kaj aliajn en la koncerna lando. Estus eble kunigi la fortojn kaj eldoni komunan gazeton (2—3 landoj kune), sed nur teorie kaj en esceptaj okazoj, ĉar ĉe ties praktika realigo aperas diversaj problemoj (financado; la legantojn de unu lando ne interesas kroniko de alia lando k.s.) Eŭropa gazeto havus sencon, se oni havus ekz-e Amerikan aŭ Azian aŭ Afrikan gazeton, laŭ mia modesta opinio. Ni bezonas *unuavice* bonan LITERATURAN REVUON, en kiu aperus kontribuaĵoj ne nur el la Nordo aŭ Sudo (Norda Prismo, Suda Stelo), sed el la tuta mondo. Pri iuj fakoj, anst. modestaj bultenoj prefere aperu unufoje jare pli impona volumo (ekz-e Geologio Internacia I kaj II, en preparo la III-a.). La hungaroj tre bone solvis la problemon de siaj E-gazetoj — Hungara Vivo, Eszperantó Magazin kaj montras vojon sekvotan. Tamen, ne ĉiuj movadoj en la mondo povas elteni tiom da elspezoj, eble eĉ ne havas tiom da spertaj kunlaborantoj.

En Alap če EMBA

Plenplena buso portis nin cent kilometrojn suden de Budapeŝto, al „loko post la dors' de Dio, en grize drona malproksim' " al la vilaĝeto Alap, kie en 1902 naskiĝis la esperantista poeto, EMBA, Imre Baranyai.

La 8-an de junio 120 esperantistoj staris antaŭ lia naskiĝdomo. Krom la ĉefurbanoj alvenis gesamideanoj ankaŭ el Dunaújváros kaj Dombóvár, kaj tie staris modeste, ploretante la fratino de EMBA.

Ĉi tie *„ĉe la petrola lampobrilo balancis min por dormallog' patrino mia en lulilo; lulilo mia estis trog' "* — diris EMBA. Kaj kiam la filo jam kreskis poeto, ankaŭ tiam reaŭdiĝis la *„nokta muziko de la martelado de la patro"* — de la mizera botisto —, *„sur lia vizaĝo amariĝ' pri premaj zorgoj de malriĉ'."*

En la pluvego ni apenaŭ povis legi la memortabulon, kiun dediĉis HEA, kaj kiun gardos la loka magistrato. La parolo de la vilaĝa ĉefulo, la bela rememoro de Maria Khek-Jurák, la poemdeklamo far Erika Rieth tuŝis ĉies korojn.

Ĉiuj vortoj, frazoj, ankaŭ nepublike diritaj, dankeme rememoris pri unu el la plej gravaj poetoj de Esperanto, kies vivovojo estis dornoplena pro la multspecaj plagoj de la tiama reĝimo.

Ankaŭ mi mem prezentis en la restoracio la lastan — neaperintan — skribaĵon de EMBA pri la hungaraj esperantistaj verkistoj, inter ili ankaŭ pri li mem.

La vizito ĉe la naskiĝdomo de Baranyai estis ne nur simpla inaŭguro de memortabulo, sed ĉefe forta elstaro por nia socialisma patrio, en kiu li povis vivi pro sia malsanado nur „azilajn" jarojn.

L. Kökény

IMRE BARANYAI

PRIMAVERO

Jen trilas trilo trile trila,
jen brilas brilo brile brila,
ĉi-ĉi-ĉi, verdas vasta valo
ĉi-ĉi-ĉi, kantas najtingalo.
En la brilo, en la trilo
floras floro, grincas grilo.
Ĉi-ĉi-ĉi, tra la tuta tero
muzikas, dancas primavero.

En granda trila-brila vervo
luliĝas ĉiu cerb' kaj nervo.
Proleto, en ĉi trilo valsa
atentu pri la tono falsa.
Eble falkoj fajfos fale
melodion najtingale.
Proleto, gajtemperamente
ekdancu, sed ne senatente!

La karajn kantojn kantu kore,
laboru bone, bonhumore,
la Ordo, fidu, regas rekte,
sed ne luliĝu sensuspekte.
Floroj floru, birdoj trilu,
en orkestro vi nur grilu.
En granda festa glordibodo
plej glora ĉi modesta voĉo.



VOPA-pasto el ok ovoj:

VOSZK

Garantias ok kokinoj

Paston de nivelo alta

Sciencaj komunikaĵoj

— rezulto de persista laboro

La esperantista socio sporade jam renkontis en la gazetaro la nomon de la Budapeŝta Esperanto-grupo *Konkordo*, kiu jam dum tri sinsekvaj akademiaj jaroj regule aranĝis dufoje ĉiumonate siajn *Sciencajn Vesperojn.*

La membroj de la grupo en 1972 konstatis, ke la nivelo kaj ofteco de la aplikado de Esperanto por sciencaj celoj estas tute ne kontentiga kaj decidis ke laŭ siaj povoj ĉi tiun gravan aferon ili provos iom antaŭenpuŝi.

Ekde la novembro de 1972 ili regule aranĝis Sciencajn Vesperojn kun altnivelaj prelegoj kaj diskutoj pri la plej diversaj branĉoj de la scienco. Dum tri akademiaj jaroj, ĉefe en la grupo, sed ankaŭ en la Scienca Sesio dum la Hungarlanda Esperanto-Kongreso en 1974 kaj eĉ ĉe la Internacia Somera Universitato en Beogrado en 1973 kaj ĉe ILUS-Konferenco en Paderborn, FRG, en 1974, la membroj de la grupo prezentis sume ĉ. 60 prelegojn.

Paralele kun tio ankaŭ alia Budapeŝta grupo, nome la *Medicina*, komencis aranĝi Sciencajn Vesperojn, kaj ankaŭ tie estis prezentitaj tre valoraj prelegoj pri la medicinaj sciencoj.

Sporade ankaŭ en aliaj kluboj en la lando oni organizis, aŭskultis kaj pridiskutis prelegojn pri pli malpli sciencaj aŭ popularsciencaj temoj.

Ĉi tiuj prelegoj klare pruvis la taŭgecon de Esperanto por aplikado al scienca informo-interŝanĝo, sed pruvis ankaŭ, ke multaj altnivelaj fakuloj tion, komprenis kaj eĉ faras ĉion eblan por evoluigi ĉi-rilate la lingvon kaj samtempe uzi ĝin kiel informo-perilon.

Post ĉiuj ĉi eventoj jam pli kaj pli sentiĝis, ke nova paŝo devas sekvi.

Vere, printempe de 1975 la Budapeŝta Teritoria Komitato de Hungara Esperanto-Asocio, kiu ĉiumonate akurate aperigas sian bultenon, oferis aperigon de parto de la prezentitaj prelegoj kiel apartan kajeron aldonitan al iu numero de Budapeŝta Informilo.

La rezulto estas 48-paĝa, riĉenhava, grafike kaj fote ilustrita kajero titolita *„Sciencaj Komunikaĵoj — Julio, 1975"* kiel aldono de Budapeŝta Informilo al sia numero de Julio-Aŭgusto, 1975.

La kajero enhavas du specojn de artikoloj. Al la unua speco apartenas dekkvin sciencaj kaj popularsciencaj artikoloj, al la dua naŭ informaj kaj recenzaj skribaĵoj.

Laŭteme la sciencaj kaj popularsciencaj artikoloj montras tre vastan spektron, ĉar *ĉiu ĉefbranĉo de la scienco* estas reprezentata per kelkaj studoj.

Koncerne la *informajn artikolojn*, la leganto versaĵne kun surprizo trastudos la plenumitan trijaran programaron de la Sciencaj Vesperoj en grupo Konkordo, kies materialo plenigus almenaŭ tri pluajn kajerojn, kavankam la aperinta Sciencaj Komunikaĵoj mem enhavas pli ol 200 mil literojn, se ne paroli pri la bildoj. Ni aldonu ke ankaŭ en la Medicina grupo pretiĝis manuskriptoj de trioble pli da prelegoj ol publikigitaj en la Sciencaj Komunikaĵoj.

Nun la redaktintoj kaj verkintoj de la kajero kaj ankaŭ alfaj membroj de la du grupoj atendas la reagojn kaj kunlaboro-proponojn de la enlanda kaj eksterlanda kolegaro. Ili ne volus halti sur la komencita vojo.

La *Sciencaj Komunikaĵoj* estas aĉetebla ĉe HEA kaj UEA por 25,— Ft-oj aŭ 5,— guldenoj.

O. H.

Frandaĵo por junaj legantoj

— Tri verkoj de J. H. Sullivan —

La junaj trezorserĉantoj. *Rakonto, originale verkita en Esperanto. 24 paĝoj, 16 x 10 cm. Ilustrita, Kartonita. Eld.: Brita Asocio de Esperanto-Instruistoj, 1968. Prezo: 1, — ned. gld.*

La longa marŝo. *Rakonto, originale verkita en Esperanto. 24 paĝoj, 16 x 10 cm. Ilustrita. Kartonita. Eld.: Brita Asocio de Esperanto-Instruistoj, 1968. Prezo: 1, — ned. gld.*

La junaj detektivoj. *Rakonto, originale verkita en Esperanto. 58 paĝoj, 16 x 10 cm. Ilustrita. Kartonita. Eld.: Brita Asocio de Esperanto-Instruistoj, 1969. Prezo: 1,74 ned. gld.*

La porinfana literaturo estas malmulte kulturita kampo en Esperantujo, kio sendube ŝuldiĝas al la fakto, ke ege malmultas legkapablaj kaj aĉetpovaj esperantistaj infanoj. La plimulto de la tiaspecaj libroj ĝis nun estas tradukaĵoj, kiuj neniam vere povis plenumi la celon destinitan: libro, kiu estas simpla, spontanea en la originalo, ne ĉiam — fakte nur tre-tre malofte — povas esti transplantita tiel, ke ĝi konservas sian artan ĉarmon kaj simplecon. La elŝvititaj „simplaj" vortoj kaj frazeologiaĵoj de tiaj tradukoj kutime grincas inter la dentoj de alilingvano, kaj krom malmultnombraj vortar-vermoj neniu trovas ĝuon en ili. Aldone mi menciu ankoraŭ, ke popolfabeloj — kio ĝenerale estas kredencita al la esperantistaj infanoj — nur tre malofte estas vera porinfana literaturo, eĉ en la originala nacia lingvo.

Sullivan, kiu estas aktiva pedagogo, certe konstatis la malpopularecon de la plimulto de nia „porinfana" literaturo, kaj li verkis tri historietojn, kiuj ĉiuvidpunkte kontentigas la postulojn por esperanta infanlibro. Rakontantaj interesan historion (en ĉiuj tri ĉefrolas infanoj!), verkitaj en simpla lingvo, havantaj pozitivan moralan konkludon, liaj verketoj devus esti legaĵoj, de ĉiuj lernejaj grupoj. Sullivan sukcesis trovi la tonon kaj la temojn, kiuj ekscitas la fantazion de la junaj legantoj (kontrabandistoj, detektivado, grandaj agoj), tamen, la recenzanto devas konfesi, ke ankaŭ lin kaptis la „etaj misteroj" de la rakontoj kaj ne povis demeti ilin antaŭ ol ellegi... kaj ne hezitis surpaperigi rekomendan recenzon pri libroj, aperintaj antaŭ duon-jardeko.

Mi bone konscias, ke tiun ĝi recenzon legos nur malmultaj infanoj, tial mi turnas min al la instruistoj: mendu la libretojn, kaj viaj lernantoj dankos vin... kaj cetere: inter la diskretaj muroj de la profesora ĉambro ankaŭ vi akiros agrablajn horetojn.

V. BENCZIK

INTERNACIA VIRINA RENKONTO

La 14-an de Julio en la festa salonego de Esperanto Grupo „Egressy", la Virina Komisiono de HFA aranĝis Internacian Virinan Renkonton.

La ĉeestantajn grupanojn kaj gastojn salutis k-dino Mici KHEK, prezidantino de la Virina Komitato.

Post la malferma parolo k-do D-ro Jozefo MÁTÉFFY, prezidanto de HEA festparolis. Li varmvoĉe laŭdis la organizan laboron de la Virina Komisiono, kiu de jaro al jaro organizas tiujn Internaciajn Renkontojn pli kaj pli altnivele.

Post la festparolo prenis voĉon du eksterlandaj gastinoj: Wiesŭawa STANISŬAWSKA el Pollando kaj Soňa HODKOVÁ el Ĉeĥoslovakio. Ili parolis pri la socia pozicio de la virinoj en ambaŭ landoj, kiu pli kaj pli progresas.

La festan etoson de la kunveno levis la bona deklamo de f-ino Margareta EVVA, kiu prezentis la poemon de Zseni VÁRNAI „NE pafu, fil'!" ne brila traduko de Tibor ÚJLAKI-NAGY.

Ro — Lo

EPITAFO DE POETO



En la ĉefaj vicoj de nia enigmo ni citas poemon de Ferenc SZILÁGYI. Ensendi sufiĉas nur la citaĵon ĝis la 20-a de decembro. Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.

HORIZONTALAJ VICOJ: 1. *Unua vico de la citaĵo, daŭrigo en la vicoj 28. horizontala, 1. vertikala, 60. horizontala, 61. vertikala kaj 78. horizontala.* 14. Dio en la greka mitologio, bela viro (Radiko). 15. Sciigi pervorte en iu slava lingvo. 16. Irigo. 18. Prefikso por formi el tabelvortoj vortojn neajn. 19. Entera aŭ subtera kavaĵo el kiu oni elfosas ekspluateblajn substancojn (R). 20. Muzulmana ŝtatoficisto (R). 21. Kurba osto, ĉirkaŭanta la bruston (R). 23. Disĵeti grajnojn sur teron por ke ili ĝermu kaj kresku. 25. Reen: ĉiu ekstrema flanko, parto. 26. Figuro de greka mitologio, simbolanta vanan laboron (R). 30. Natrio. 31. La fatamorgano (artikolo kaj radiko). 33. Malplezuri pro neokupiteco. 34. Mezurunuo de pezo, 1000 kg-oj (R). 35. Metoda aranĝo, ordigo de nomoj, nombroj aŭ signoj (R). 37. Oksigeno, ntirogeno kaj fosforo. 38. Kolerigo au ĉagrenado per vortoj malrespektaj. 41. Havas en la manoj. 43. Konjunkcio uzata post komparativo. 44. *Kultura kaj literatura revuo kiun fondis kaj redaktis F. SZILÁGYI.* 46. TR. 47. Baptonomo de franca filmaktoro DELON. 49. Trinkaĵo de la olimpaj dioj (R). 50. Kunsono de versfinaĵoj. (R). 52. Kombinaĵo de oksigeno kun aliaj elementoj (R). 54. RTA. 55. Moviĝas per piedoj. 57. Poeta amkonfeso. 59. RS. 62. Kemia elemento, metalo (Os). 63. Almeti la fingron (R.) 65. Estro de monaĥejo. (R). 67. Kolektiva. 68. La unua stilisto de Esperanto (pseŭdonimo). 69. Malfacile paŝanta pro kripleco de kruro (R). 71. Miksita emo! 73. Forta agitiĝo de la animo kaŭzata de ofendo (R). 74. Tutaĵo de ĉio, kio ekzistas. 77. Samfamiliano (R).

VERTIKALAJ VICOJ: 2. Konforma al la ideo kiun ni havas pri perfekteco. 3. Cirkloforma. 4. Meriti. 5. Supernatura estaĵo — laŭkreda. 6. Kemia simbolo de elemento nomata pri EINSTEIN. 7. Sufikso esprimanta ĝeneralan ideon de naskiteco. 8. Varma ŝirmejo sur homa brusto (R). 9. Ago por reprodukti tekstojn kaj bildojn (R). 10. Mezuro de longo, 1/12 de colo aŭ 2,256 mm. 11. Sufikso montranta kolektivecon. 12. Ano de granda imperio fondita en la jaro 962 kaj malaperinta en 1806. 13. 1051 — per romiaj ciferoj. 17. Iri por vidi iun hejme (R). 21. Sama kiel vico. 50. 22. Mara rabisto (R). 24. MKE. 26. Malpeza somera piedvestaĵo. 27. *TRANS LA . . . : titolo de novelaro verkita de F. SZILÁGYI.* 29. Edzino de Jupitro. 31. Koncernanta la unuan tagon de la semajno. 32. Embarason. 34. Ekstera firma tavolo de nia planedo (R). 36. Ovnaska kvarpieda rampulo, kun longa maldika vosto. 39. Malproksimiĝo. 40. Ne travidebla. 42. Aro da personoj aliĝintaj al ia aparta doktrino. 45. Gramatika finaĵo kiu elvokis multajn diskutojn. 48. Akva feo. 51. Kontraŭulo (R). 53. Mane aŭ ile malpliigi la vibradon de kordo. 56. Fandita besta graso, precipe de remaĉuloj. (R). 58. Plurala poseda pronomo. 59. Fama pentristo, majstro de barokarto, flamando (1577—1640). 63. Iama germana arĝenta monero (R). 64. Ĝi kovras la korpon de la birdoj (R). 66. Spongeca brulema substanco estiĝanta en marĉoj (R). 68. Volonte. 70. Reen: rilata al femalo. 72. Mallonga literatura verko, en kiu la aŭtoro ne intencas funde pritrakti sian temon (R). 73. Malplenaĵo en solida materio aŭ organo (R). 75. VO. 76. Verba finaĵo. 77. Fosforo kaj sulfuro.

FERI

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 75/3 estas: „La temp'ne cedas, volas plenumiĝon, — la mond' graveda naskos homfeliĉon, — la homo venkos spite al la homo."

Libropremion gajnis: Orsolya Zombori kaj Gyula Madarász el Hungario, Viktoro Arolovič el Sovetunio.

KALENDARO

1950—10—02 Antaŭ 25 jaroj mortis George Bernard SHAW, Nobel-premiita angla dramverkisto, socialisma publicisto.

1500—10—03 Antaŭ 475 jaroj naskiĝis Benvenuto CELLINI, itala juvelisto, skulptisto kaj verkisto.

1900—10—19 Antaŭ 75 jaroj naskiĝis Anna SEGHERS, germana socialista verkistino, premiita per Pacpremio Lenin.

1945—10—24 Antaŭ 30 jaroj oficialiĝis la statuto de Unuiĝintaj Nacioj. De tiam ĝi estas „Tago de Unuiĝintaj Nacioj".

1900—10—30 Antaŭ 75 jaroj mortis Oscar WILDE, angla verkisto, poeto kaj dramverkisto.

1840—11—12 Antaŭ 135 jaroj naskiĝis Auguste RODIN, franca skulptartisto.

1630—11—15 Antaŭ 345 jaroj mortis Johannes KEPLER, germana astronomo kaj matematikisto. Li difinis la bazajn leĝojn de la moviĝo de la astroj kaj planedoj.

1875—11—23 Antaŭ 100 jaroj naskiĝis Jenő LANDLER, hungara advokato, elstara figuro de la hungara kaj internacia laborista movado.

1820—11—28 Antaŭ 155 jaroj naskiĝis Friedrich ENGELS, germana filozofo kaj ekonomikisto. Kun K. Marx prilaboranto de la teorio pri scienca socialismo.

Komp. L. RIETH

VERSEK

Fordította:
KALOCSAY KÁLMÁN

POEMOJ

Tradukis:
KOLOMANO KALOCSAY

Mezei András (1930—)

MINDENKORON

Mikor az ostobák ledobták
a toronyból a madarat,
hogy zuhanjon, akár a kő —
lenn a tajtékzó agarak.

Mindenkoron az volt a szép,
ha egy öldöklés elmaradt.
Kinyílt a szárny a kőből is
és fennmaradt, és fennmaradt.

András Mezei (1930—

EN ĈIUJ TEMPOJ

Stultuloj ĵetis el la turo
la birdon al la gruzo grunda,
ke ĝi falegu kiel ŝtono —
Malsupre ŝaŭmis ar' ĉashunda.

En ĉiuj tempoj tio belis,
se murd' fiaske restis for.
Flugiloj eĉ el ŝton' disfrapis
por ŝveba sor', por ŝveba sor'.

El la mini-libreto (6×4 cm.) redaktita de Perla Plug *(Gyöngyi Szántó) kaj enhavanta dek unu poemojn de hungaraj poetoj hungare kaj Esperante supre videblas fotite du titolpaĝoj kaj du kontraŭaj paĝoj.*

Leterkesto

Ŝajnas, ke niaj karaj legantoj ankoraŭ „gustumas" la du lastajn numerojn de HV (la 2-an kaj la 3-an), ĉar lastatempe ili ne sendis al ni multe da publikindaj leteroj. Tamen estas kelkaj, ĉefe el Bulgario kaj Sovetunio.

Unu el ili — tiu de Gennadij REDIN, Orenburg, Sovetunio — post longa laŭdado de la bona stilo kaj intereseco de HV, tuŝas specialan demandon. Ni citas lin: „Ĉi-loke mi devas ankaŭ „voĉdoni" por la reklamoj, malaprobitaj far kelkaj sanoj; mi eĉ deziras, ke la reklamoj estu pli allogaj kaj vekantaj intereson en la publiko, precipe en la junularo."

Longan leteron ni ricevis de Georgi SIMEONOV, Vidin, Bulgario. Ĝi estas riĉenhava, varieca, Jen:

„... Estus morala devo de ĉiu serioza e-isto kuraĝigi Vin, kiuj senlace laboras perfektigante la lingvon kaj montrante ĝian praktikan valoron.

... Mi tre ŝatas la rakontojn en la revuo HV. La plej grandan impreson faris al mi la rakonto titolita „Amo"; mi tradukis ĝin al mia edzino, kaj ŝi jam ofte turniĝas al mi per la sekvaj vortoj: „sola mia"...

... Laŭdinda estas via ideo pri la tutlanda arkivo de la E-movado.

... En la ĉi-jara dua numero de HV mi legis la komunikon pri la 7-a Konsultiĝo de reprezentantoj de E-asocioj kaj movadoj en socialismaj landoj. Ĉu ne estus eble, ke vi decidus eldoni kaj kompili komunan revuon sub la titolo „Tutmonda Amikeco"?

... Nuntempe la solvo de la lingvaj demandoj estas en la manoj de la scienculoj, kiuj treege bezonus komunan lingvon por bone interkompreniĝi...".

Korespondi deziras

El Sovetunio: E-Rondo ĉe Kieva Medicina Instituto dez. kor. pri medicinsciencaj problemoj (infekt-, epidem- kaj invaziaj malsanoj, medicingeografio, historio de medicino, ktp.). Adreso: D-ro BOGDANOV, Kieva Medicina Instituto, 252003 Kiev.

El Italio: S-ino Anna Maria BARDONI, Via de Nicola 14, 20100 Milano. — S-ro Walter SAIANI, Viale Romagna 15, 20100 Milano. — S-ino Giuseppina CICERI NEGRI, Via Necenate 23/2, 20100 Milano. — F—10 Romano SOLAZZO, Viale Ungheria 19, 20100 Milano. — F-ino Antonia SCHENA, Via Tajani 6, 20100 Milano. — Lidia FRESCO, Via Columella 20/6, 20100 Milano. — S-ino Luigia MINOLI ZINI, Piazza Leonardo da Vinci 3, 20100 Milano.

El Pollando: S-ino Kazimira KRAUSE, ul. Rynek 3, 63—500 Ostrzeszów, dez. kor. pri ĉio kun la t.m.

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
1368. Budapest, Hungario,
Kenyérmező u. 6.
Aperas dumonate
XV. jaro. 1975. 5-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro:
d-ro Jozefo Mátéffy
Lingva revizio: K. Kalocsay
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Csíszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyarmathy, d-ro Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, László Rieth, Aurél Ponori Thewrewk, Mária Rózsa Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Újlaky-Nagy

Ĉefkunlaborantoj:
D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Lajos Tárkony

Redakcio: Budapest, VIII.
Kenyérmező utca 6.
Telefono: 141-078
Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215—96162 Budapest. V. József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj) Ft. 48.—, al eksterlando krome Ft 9.60 por afranko.

Eksterlande disvastigas „KULTÚRA" Eksterlandkomerca Entrepreno por Libroj kaj Gazetoj — 1389 Budapest, Pf. 149. Abonprezo por eksterlandanoj jare 6 Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto.

75. 805 Dürer Nyomda
Indexszám: 25.377

LEHEL

MODERNA MASTRUMADO

MODERNA FRIDUJO

Produktas: FRIDUJFABRIKO

Konsumturist



Valoraj artobjektoj
porcelano de bona marko
stilmebloj

Varojn aĉetitajn
en supraj vendejoj oni povas
sendogane elporti el la lando

Vi povas aĉeti el granda sortimento kontraŭ valuto internacie ŝanĝebla

en niaj vendejoj en Budapesto:
I. Hess András tér 3
Hotel Intercontinental–Hotel Gellért
VI. Népköztársaság utja 27.